


V-19034/1971



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報通

12
1971



Ruǒgǔardia orkestro

Deklaro

de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko

La 29-an de oktobro, 1971

EN la 25-a de oktobro, 1971, la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj aprobis per superega plimulto da voĉoj la projektan rezolucion elmetitan de Albanio, Alĝerio kaj 21 aliaj landoj postulantan restarigon de ĉiuj laŭleĝaj rajtoj de nia lando en la Unuiĝintaj Nacioj kaj tujan forpelon de la reprezentantoj de Ĉiang Kajŝek-kliko el la Unuiĝintaj Nacioj kaj el ties subordigitaj organizoj. Tio estas bankroto de la politiko, obstine praktikata de la usona imperiismo dum la pasintaj pli ol 20 jaroj, por senigian landon je la laŭleĝaj rajtoj en la Unuiĝintaj Nacioj, kaj bankroto de ĝia intrigo de kreo de “du Ĉinioj” en la Unuiĝintaj Nacioj. Tio estas venko de la proletara

revolucia diplomatia linio de Prezidanto Maŭ kaj venko de la popoloj kaj ĉiuj justec-defendaj landoj tra la tuta mondo.

La registaroj de Albanio, Alĝerio kaj aliaj landoj-proponintoj faris eminentajn kontribuojn en ĉi tiu batalo. Multaj amikaj landoj, precipe la Registaro de Kamboĝa Reĝlando sub la gvido de Samdek Norodom Sihanuk, faris persistan kaj senlacan penadon dum longa tempo por restarigi la laŭleĝajn rajtojn de nia lando en la Unuiĝintaj Nacioj kaj ludis en tio gravan rolon. La ĉinaj registaro kaj popolo esprimas elkorajn dankojn al la registaroj kaj popoloj de ĉiuj amikaj landoj, kiuj persistis en principoj kaj defendis la justecon.

Vizito de Lia Imperiestra Majesto Haile Selassie la Unua al Ĉinio

De la 6-a ĝis la 12-a de oktobro, laŭ la invito de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko, Lia Imperiestra Majesto de la Etiopia Imperio Haile Selassie la Unua kaj lia akompanantaro faris ŝtatan viziton al nia lando kaj estis varme bonvenigataj de la popolo de nia lando.

La 8-an de oktobro, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong faris intiman kaj amikan intervidiĝon kun Lia Imperiestra Majesto de la Etiopia Imperio Haile Selassie la Unua kaj lia akompanantaro. Lia Imperiestra Majesto ankaŭ faris sincerajn kaj amikajn interparolojn kun gvidantoj de nia lando pri plifortigo de amika kunlabora interrilato inter la du landoj kaj pri la problemoj interesantaj ambaŭ landojn, kaj akiris pozitivan rezulton.

Sub la akompano de Ĉefministro Ĝou Enlaj kaj aliaj, Lia Imperiestra Majesto kaj aliaj etiopiaj honorindaj gastoj faris vizitojn al Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono. La vizito de Lia Imperiestra Majesto al nia lando akcelis la interkomprenon de ambaŭ popoloj kaj amikan kunlaboron de ambaŭ landoj kaj faris novan kontribuon al la plifortigo de la unuiĝo de la aziaj kaj afrikaj popoloj en la kontraŭimperiisma afero.



Prezidanto Maŭ manpremas kun Lia Imperiestra Majesto Haile Selassie la Unua.




Interparolo de Vicprezidanto Dong Bivu de la Ĉina Popola Respubliko kaj Ĉefministro Ĝou Enlaj de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio kun Lia Imperiestra Majesto Haile Selassie la Unua






Prezidanto Maŭ intervidiĝas kun Lia Imperiestra Majesto Haile Selassie la Unua.

En Ŝanhajo, Lia Imperiestra Majesto Haile Selassie la Unua venis al la teraso de la Ŝanhaja Domego kaj de tie pririgardas la urbon.





En Pekino Lia Imperiestra Majesto Haile Selassie la Unua ĉestis la bonvenigan artan vesperon kaj spektis la revolucion modernan pekinoperon *Ruĝa Signal-lanterno*. Post prezentado kune fotiĝas la gastoj, gastigantoj kaj aktoroj.



Lia Imperiestra Majesto Haile Selassie la Unua Vizitas la Pekinan Ĝeneralan Petrol-kemian Fabrikon kaj tie estas varme bonvenigata de miloj da laboristoj de la fabriko.

La Popolanoj de Nia Ĉefurbo Ĝoje Celebras Nian Brilan Nacian Feston


LA unuan de oktobro, en Pekino flirtis ruĝaj flagoj kaj laŭte sonoris kantoj. Kun vigla spirito kaj granda ĝojo la popolanoj de nia ĉefurbo entuziasme celebris la 22-an datrevenon de la fondiĝo de la granda Ĉina Popola Respubliko.

Frumatene, laŭte kantante revoluciajn kantojn, vicoj kaj vicoj da laboristoj, komunumanoj, komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA, ruĝaj gvardianoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj de la ĉefurbo venis al diversaj parkoj por partopreni celebrajn aktivadojn.

Antaŭtagmeze, Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo, kaj lia edzino, Samdek Penn Nouth, prezidanto de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo kaj ĉefministro de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo, kaj lia edzino, sinjoro Ieng Sari, speciala delegito de la enlanda parto de Kamboĝo, akompanate de Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, vicĉefministro Li Hiannian, Je Gianjing, vicprezidanto de

la Komisiono pri Militaj Aferoj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj Guo Moĵuo, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rerezentantoj, venis al la Somera Palaco en okcidenta antaŭurbo de Pekino por celebri la brilan feston de nia popolo kune kun la ĉefurbaj popolanoj.

Ruĝaj gvardianoj prezentis por la honorindaj gastoj kantodancojn *Freŝajn Flo-rojn al Samdek Norodom Sihanuk, Eternan Vivon al Prezidanto Maŭ* kaj aliajn. Akompanate de la gvidantoj de nia lando, la honorindaj gastoj ankaŭ ĝuis la pitoreskan pejzaĝon de la Somera Palaco veturante per boatoj sur Kunming-lago. Laŭtaj kantoj sonoris super Kunming-lago sur kiu jubilis amasoj. Alte tenante kolorajn balonojn kaj svingante buntajn bukedojn, la amasoj sur pli ol 200 boatoj varme ak-lamis al Samdek Norodom Sihanuk, esprimante sian decidon respondi al la alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj firme subteni la popolojn de Kamboĝo, Vjetnamio kaj Laoso en ilia nancisava milito kontraŭ la usona agreso ĝis la kompleta venko.



Akompanate de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj, Samdek Norodom Sihanuk kaj lia edzino vizitas la Someran Palacon.

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj gvidantoj de nia lando aranĝis tie celebran bankedon en honoro al la respektindaj kamboĝaj gastoj.

Vespere de la 30-a de septembro kaj la unua de oktobro la Ministerio de Eksteraj Aferoj, la Departemento de Internaciaj Rilatoj de la Centra Komitato de la Partio, la Kultura Grupo de la Ŝtata Konsilantaro kaj la Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj la Oficejo de la Ŝtata Konsilantaro de nia lando respektive aranĝis nacifestajn akceptojn por la honorindaj gastoj, specialistoj,

senditoj kaj amikoj de diversaj landoj kaj la samlandanoj el Hongkongo kaj Aŭmen kaj reprezentantoj de la patriotaj transmaraj elmigrintaj ĉinoj, kiuj venis partopreni la Nacian Feston. La akceptojn regis varma atmosfero de revolucia amikeco kaj batala unuiĝo inter la ĉina popolo kaj diverslandaj popoloj de la mondo.

La partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de nia lando kamaradoj Dong Bivu, Ĝoŭ Enlaj, Giang King, Ĝang Ĉunkiaŭ, Jaŭ Venjuan, Li Hiannian kaj aliaj ĉeestis respektive la akceptojn.



Ankaŭ la fremdlandaj amikoj venintaj el la kvin kontinentoj partoprenis en la celebraj aktivadoj en parkoj kune kun la ĉefurbaj popolanoj en la unua de oktobro. Ili alportis ĝojindajn informojn pri venkoj de la revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj de la mondo kaj ilian batalan amikecon al la ĉina popolo.

Sub la direktado de la proletara revolucia linio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, alte tenante la standardon de unuiĝo kaj venko de la Naŭa Kongreso de la Partio, diversnaciecaj popolanoj de nia lando tenas revolucion kaj stimulas produkton kaj akiris novajn atingojn.


La ĉefurbaj laboristoj, kiuj penetrive disvolvas la amasan movadon "**lerni de Daking en industrio**", partoprenis la celebrajn en parkoj kun senkompara ĝojo. La laboristoj de la Ĉefurba Fera kaj Ŝtala Kompanio, kiuj superplenumis en septembro la tutjarajn produktajn planojn de ŝtalo, fero, ŝtal-laminataĵoj kaj aliaj

Armeanoj kaj popolanoj de nia ĉefurbo ĝoje celebras la Nacian Feston kaj aklamas la grandan venkon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.






La Ministerio de Eksteraj Aferoj donas solenan akcepton por celebri la Nacian Feston. Dong Bivu, Li Hiannian kaj aliaj gvidantaj kamaradoj iras en la salonon kune kun fremdlandaj gastoj.



La Departemento de Internaciaj Rilatoj de CK de KPĈ donas solenan akcepton por celebri la Nacian Feston. La foto montras, ke kamaradoj Jaŭ Venjuan, Geng Biaŭ kaj aliaj iras en la akceptan salonon kune kun gekamaradoj de frataj partioj.



La Kultura Grupo de la Ŝtata Konsilantaro kaj la Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj donas grandiozan akcepton por celebri nian Nacian Feston. Ĝoŭ Enlaj, Giang King, Ĝang Ĉunkiaŭ kaj aliaj gvidantaj kamaradoj eniras la salonon kune kun fremdlandaj gastoj.

ĉefaj produktaĵoj, plentuziasme kantis sur la surakva scenejo en la Somera Palaco. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Pekina Hinhua-presejo, kiuj presis ĉijare pli ol 15 milionojn da ekzempleroj da verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj grandan kvanton da verkoj de Prezidanto Maŭ, prezentis en Ĝongŝan-parko dancojn kiel *Presistoj Estas Ĉiam Fidelaj al Prezidanto Maŭ*, kiuj ricevis varmajn aplaŭdojn de la vasta spektatoraro.

Frumatene, kun granda ĝojo la reprezentantoj de antaŭurbaj popolkomunumanoj venis al la celebraj lokoj. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de multaj komunumoj kaj produktaj brigadoj prezentis aŭ spektis kanto-dancajn programerojn kiaj estas *Batalakiri Riĉrikoltojn en Lerno de Daĝaj* kaj *Ĝoje Sunumi Grenon por Preparo kontraŭ Milito*. Ĉijare la vastaj amasoj de kadroj, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de

diversaj komunumoj kultivas kampojn por la revolucio kaj akiris alian riĉrikolton per luktado kontraŭ la naturo. La produktokvanto nur de someraj grenoj de la Ĉina-Vjetnama Amikeca Popola Komunumo atingis 5,000 tunojn, kiu egalas al la totala jara produktokvanto de 1965 antaŭ la granda kultura revolucio. En la unua de oktobro, Li Giuling, sekretario de la partia komitato de tiu komunumo, ĝoje venis al la parko Ĉiela Altaro kaj partoprenis la celebradon kune kun la reprezentantoj de malriĉkampanoj kaj mal-superaj mezkampanoj.

La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la ĉefurbaj universitatoj, mezlernejoj kaj elementaj lernejoj entuziasme partoprenis en la celebraj aktivadoj. La danco redaktita kaj prezentita de la revoluciaj instruistoj kaj studentoj de la Pekina Universitato *Vivu la Proletara Eduka Linio de Prezidanto Maŭ* plene spegulas la atingojn akiritajn de la instruistoj kaj studentoj de la fakultatoj de literaturo, artoj kaj sociaj sciencoj de la Pekina Universitato en efektivigo de la instrukcio de Prezidanto Maŭ **“La fakultatoj de literaturo, artoj kaj sociaj sciencoj devas preni la tutan socion kiel sian fabrikon”**. Liu Kingŝuang, membro de la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso en Kinghua-universitato, aparte emociiĝis, kiam li partoprenis la nacifestan celebradon en parko. Li diris: Nia laborista propaganda taĉmento nepre plene ludos la politikan rolon sub la gvido de la Partio kaj bone kondukos la edukan revolucion.

“La varma suno transpasis la neĝmonton kaj ore brilas la akvo en Jalucangporivero.” Tibeta danco prezentita en la arbaro de tujoj de la Kultura Palaco de Laboruloj emociis tibetan knabinon Lamu inter la spektoroj. Tiu liberigita servutolino, kiu servis al mastro-sinjoro de sia infanaĝo kune kun la patrino kaj kreskis en mizero, hodiaŭ fariĝis glora kompar-

tiano. En la malnova socio, ŝi vivis mal-facile kvazaŭ orfo. En la nova socio, ŝi havas centmilionojn da gefratoj. En tiu momento, ĝuste apud ŝi, ujuguraj kaj kazaĥaj kamaradoj venintaj de montpiedo de Tianŝan, mongolaj kamaradoj de la stepo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, fratoj de la Janbian-a Korea Aŭtonoma Regiono kaj kamaradoj de hana, huja, ĝŭanga, taja, naŝia, dahura kaj aliaj frataj naciecoj kune ĝoje pasigis la Nacian Feston. Kiel kortuŝa estis tiu revolucia sceno de unuiĝo kaj venko!

La reprezentantoj de la samlandanoj el Hongkongo kaj Aŭmen kaj la patriotaj transmaraj elmigrintaj ĉinoj venintaj spite al longa vojaĝo partoprenis en la celebraj aktivadoj en parkoj. Iu patriota ĉino loĝanta en Kanado fotis per kino-fotografilo multajn kortuŝajn scenojn en la Somera Palaco. Li diris: “Unu vido superas cent aŭdojn. En la mallongaj kelkaj tagoj post mia reveno al la patrujo, mi propraokule vidis, kiel prospera estas la socialisma patrolando, mi sentas en mi fieron.” Iu maljuna blankhara ĉino el Tajvan-provinco elmigrinta al Japanio diris kun emocio: “Tia grandioza varma sceno spegulas la senprecedencan unuiĝon kaj unuecon de la tutlanda popolo sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Estos bone, kiam la popolanoj en Tajvan-provinco povos celebri la feston kune kun la popolo de la patrolando. Ni firme oponas kontraŭ la intrigoj de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj krei la tiel nomatajn ‘du Ĉiniojn’, ‘unu Ĉinion, unu Tajvan’ kaj ‘sendependiĝan movadon de Tajvan’. La popolanoj en Tajvan-provinco sopiras al la granda socialisma patrolando. Tajvan certe revenos en la sinon de sia patrolando!”

Senĉese disvolviĝas la granda revolucia unuiĝo de diversnaciecaj popolanoj de nia lando. Senĉese disvolviĝas la granda unuiĝo inter nia popolo kaj la revoluciaj popoloj de la mondo. Ĉinio marŝas antaŭen.

毛主席的革命文艺路线胜利万岁



Amatoraj artistoj de Pekino prezentas kantodancon "Ĉiunaciecaj Popoloj Amas Prezidanton Maŭ".



Fremdlandaj geamikoj ĝoje celebras la Nacian Feston de nia lando kune kun la pekinaj popolanoj.



Fragmento el la revolucia moderna baledo *Ruĝa Virina Taĉmento* en la parko Gongšan prezentata de garnizona trupo en Pekino rikoltis varmajn aplaŭdojn.

Per novaj atingoj en tenado de revolucio kaj stimulado de produktado la laboristaro de nia ĉefurbo ĝoje celebras la Nacian Feston.




“Bonvenon! Bonvenon!” al la fremdlandaj gastoj venantaj por partopreni nian festan aktivadon.





Fremdlandaj gastoj kiuj venas por partopreni la festadon en parko estas varme bonvenigataj.






La danco "Fenestra Papertranĉaĵo"

Karboministoj de Pekino prezentas la programeron "Lerni de Daking en Industrio" sur Kunming-lago en la Somera Palaco.

Membroj de popolaj komunumoj en la antaŭurboj de Pekino festas la 22-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko per diversaj artaj aktivadoj en la parko Ĉiela Altaro.



Marŝo al Agrikultura Mekanikigo


“La fundamenta elirejo de agrikulturo estas mekanikigo.” Per tiu diro Prezidanto Maŭ montris la brilan kaj grandan perspektivon por la disvolviĝo de socialisma agrikulturo de nia lando. Efektivigi agrikulturan mekanikigon sur la bazo de agrikultura kolektivigo estas arda deziro de la vastaj amasoj de nia lando kaj la baza linio de nia Partio en la kamparo. La komunumanoj de nia Daĝaj-brigado turnis nian malriĉan montvilaĝon en novan socialisman vilaĝon marŝante de interhelpa grupo al popola komunumo, de kolektivigo al mekanikigo. Nun ni jam fundamente efektivigis mekanikigon de draŝado, senŝeligado kaj muelado de greno, dispecigado de herbo kaj brutonutraĵo kaj parte efektivigis mekanikigon de transportado kaj ebenigado, transformado kaj plugado de tero. La agrikultura mekanikigo akcelis ne nur efektivigon de stabila riĉa rikolto de agrikulturo, sed ankaŭ disvolviĝon de forstumado, brutobredado kaj flankokupo. En 1970, ĉiu muo da tero donis meznombre 535.5 kilogramojn da


greno, tiel ke multe boniĝis la vivo de la komunumanoj.

Kun la disvolvo de agrikultura kolektivigo, la vastaj amasoj de komunumanoj de nia Daĝaj kaj Hijang-gubernio delonge jam deziras efektivigi agrikulturan mekanikigon. Sed la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj serioze malhelpis la efektivigon de mekanikigo en montregionoj per la galimatioj, ke “en la malgrandaj parceloj de montregionoj traktoro eĉ ne povas sin turni”, “la montregionoj estas malriĉaj kaj ne havas monon por aĉeti maŝinojn”, “mekanikigo de montregionoj estas neesperbla,” ktp, ktp. Nia Daĝaj refutis per fakto tiujn absurdaĵojn. Agrikultura mekanikigo en montregionoj ne estas afero senespera, sed afero kun vasta perspektivo.

Daĝaj havas 800 muojn da agroj, kaj antaŭ la Liberiĝo ĉiu muo donis meznombre malpli ol 50 kg. da greno. Sed en 1970, la pomua produk-

Membroj de Daĝaj-komunumo sekigas maizon per maŝino.





*Porti sterkon sur monton
per telfero*

tokvanto de greno 5-obliĝis kompare kun tiu en la komenca periodo de kolektivigo. La komuna akumulo superis 800,000 juanojn kaj meznombro ĉiu familio havas 10,000 juanojn. La senĉesa fortiĝo de la kolektiva ekonomio kreis ekonomiajn kondiĉojn por efektivigo de agrikultura mekanikigo.

Tre dise lokiĝas la agroj de Daĝaj. Oni diris, ke la deklivoj pendas sur la montoj kaj la valoj profundas inter la montoj. Dank' al la forto de kolektiva ekonomio ni transformis montojn, deklivojn kaj valojn, kaj faris akvokonservan konstruadon. Post penado de pli ol 10 jaroj, ni kreis agrojn en la valoj per konstruo de baraĵoj, la malgrandaj parceloj grandiĝis, plejparto de la agroj

povas esti plugata per traktoroj kaj serpentaj vojetoj estas iom post iom larĝigitaj. Ankaŭ aliformo de la tereno kreis favoran kondiĉon por efektivigo de agrikultura mekanikigo.

Nia Daĝaj ekuzis elektron en 1965. Antaŭe mueliloj estis turnataj de virinoj por prepari milionojn da farunon. Unu virino kaj unu azeno en unu tago povis mueli nur dekojn da kg. da grenoj, kio ne nur malhelpis la virinojn partopreni en kampa laboro, sed ankaŭ estis tre laciga por ili. Se virinoj partoprenis en kampa laboro tutan tagon, ili devis turnadi muelilon nokte sub olea lampo. Sed nun senŝeligado kaj muelado estas plenumataj per maŝinoj. La pli ol 115 tunoj da greno bezonataj de la brigado en ĉiu jaro nun estas prilabora-

taĵ per maŝinoj, dank' al kio liberigis multaj laborfortoj de virinoj. Antaŭe draŝado estis farata per rulŝtonoj tirataj de azenoj aŭ frapado per bastono. Unu forta laborulo ĉiutage povis draŝi nur 250 kg. da maizo. En la pasinta jaro, la pomua produktokvanto de maizo superis 600 kg, sed per maŝinoj 9 homoj findraŝis la tutan rikoltaĵon en duonmonato. Ankaŭ en herbotranĉado, muelado kaj dispecigado de brutonutraĵo ni ekuzis maŝinojn. En transportado ni anstataŭigis azenojn kaj homojn per ĉaroj kaj telferoj. Antaŭe transportado en kampoj ĉefe estis farata per brutoj kaj homa forto. Tiam la ŝultroj de homoj estis preskaŭ nedisigeblaj de portvektoj. Unu homo povis transporti ĉiutage nur 300-400 kg. En la tempo de altgrada kooperativo ni havis ĉevalĉaron. Poste ni akiris aliajn 3 ĉevalĉarojn kaj krome ankaŭ traktoretojn, tial reduktiĝis la transportado per homa forto. Ekde 1965, ni instalas unun post alia 5 telferojn kun totala longeco de pli ol 2,500 metroj. Antaŭe la grandajn ŝtonegojn kiujn ni bezonis en konstruado de digoj ni portis kelkope de valoj sur montojn; sed nun en nur 5 aŭ 6 minutoj la telfero jam povas transporti ŝtonon kun pezo de ĉ. 300 kg. Plejparto de kelkmil tunoj da sterkaĵoj bezonataj de la kampoj en ĉiu jaro estis transportitaj per telferoj. Tiuj telferoj povas ŝpari ĉiujare pli ol 10,000 labortagojn. En fundamenta konstruado de kampoj ni jam ekuzis buldozon.

La laboro plenumita de ĉiuj ĉi tiuj agrikulturaj maŝinoj egalas al laboro de pli ol 30,000 homoj en unu tago aŭ al 60% de la laboro de la tuta brigado. Iuj pezaj laboroj estas plenumataj de maŝinoj. Mekanikigo de iuj laboroj fundamente solvis la problemon de manko de homoj, pliapaŝe liberigis la penson de la amasoj kaj disvolvis ilian saĝon kaj kreivon.


Ni rigardu la tutan gubernion Hijang. En la lastaj jaroj, per la forto de kolektiva ekonomio, ni transformis la montregionon, parte efektivigis mekanikigon kaj duonmekanikigon, kreis kondiĉojn por pliapaŝa efektivigo de mekanikigo. En la granda kultura revolucio, rapide progresis la agrikultura mekanikigo. Nun en la gubernio estas ŝoseoj kun totala longeco de pli ol 600 kilometroj; 90% de la brigadoj estas atingeblaj por aŭtoj; en longdistanca transportado oni plejparte uzas ĉarojn; iuj brigadoj povas transporti surmonten per aŭtoj kaj traktoroj; la tuta gubernio havas pli ol 800 motorojn, pli ol 1,000 dispecigajn kaj prilaborajn maŝinojn, pli ol duono de la brigadoj efektivigis mekanikigon kaj duonmekanikigon en

prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. Dank' al uzo de maŝinoj ni povas elŝpari pli multe da homa forto por kampa fundamenta konstruado, kaj en la lastaj jaroj nia gubernio kreis 280,000 muojn da "Daĝaj-tipaj kampoj" kaj pli ol 30,000 muojn da irigaciataj kampoj.

En Hijang estas brigado Nannaŭ, kiu situas sur monto pli ol 1,000 metrojn alta. Estis tre malfacile transporti tien trinkakvon kaj karbon. En la granda kultura revolucio, la komunumanoj starigis sur la alta monto altensian elektran draton, konstruis ŝoseon kaj efektivigis transportadon perĉaran, kondukis akvon sur monton kaj ekuzis maŝinojn en prilaborado de greno. La amasoj diris: "Dank' al ideologia revoluciigo oni povas krei kondiĉojn por efektivigi mekanikigon sur altaj montoj!"

En kolektivigo oni bezonis gvidantojn kaj ankaŭ en agrikultura mekanikigo oni bezonas gvidantojn. Ni Daĝaj-anoj ofte diras: "Rapide kuras vago-

Muelado de faruno per maŝino



naro dank' al lokomotiva fano." Ekde la tempo de elementa kooperativo nia Daĝaj-brigado komencis plenumi la principon, ke kadroj partoprenis en kolektiva laboro. De 1967 ĝis nun, la kadroj de gubernia nivelo de Hijang ĉiujare laboris 100 tagojn, tiuj de komunuma nivelo 200 tagojn kaj tiuj de brigada nivelo 300 tagojn.

Antaŭe iuj diris, ke "havante malmulte da maŝinoj Daĝaj akiris pomuan produktokvanton de pli ol 500 kg. da greno, tio montris ke sufiĉas jam la revolucia spirito", kaj ke "efektivigante mekanikigon oni facile perdos la revolucion spiriton de penema luktado kontraŭ malfaciloj". Tia opinio, kiu starigas revoluciigon kontraŭ mekanikigo, estas malprava metafizika vidpunkto. Daĝaj ĉiam persistas en disvolvo de la revolucia spirito de penema luktado kontraŭ malfaciloj, kaj neniam neglektas eblan mekanikigon kaj teknikan transformon. La pomua produktokvanto de 500 kg. da greno en 1970 ja estas frukto de kombino de revolucia spirito kun teknika renovigo, de kombino de penema kaj solida laborado kun mekanikigo.

Nun iuj laboroj en agrikultura produktado de nia lando ankoraŭ estas farataj per la manoj.

Sed la forto de homaj manoj estas limigita. Tial ni ne devas kontentiĝi je portado de ŝtonoj kaj kreo de ŝtuparaj kampoj. En la pasinta jaro, per mempreparita dinamito kaj buldozo ni kreis grandarean agron sur montsupro. La mekanikigo de nia Daĝaj kaj Hijang-gubernio estas bazita sur la forto de kolektiva ekonomio kaj sinapogo sur propraj fortoj. Kompreneble, helpo donita de la ŝtato kaj industria fronto estas necesa, tamen mekanikigado devas esti farata sub la principo sinapogi sur propraj fortoj kun klopodado por mem pretigi kapitalon, mem serĉi materialojn kaj mem fabriki kaj ripari maŝinojn. Havante mobilizitajn amasojn, ĝustan linion kaj grandan entuziasmon, oni povas venki ĉian malfacilon. En la procedo de kolektivigo Daĝaj-brigado konstante edukas siajn membrojn per Maŭzedongpenso, helpas ilin starigi la penson "agrikulturi por la revolucio"; same en la procedo de mekanikigo oni devas firme teni politikan kaj ideologian edukon kaj starigi la penson "mekanikigi por la revolucio". La maŝinoj estas fabrikitaj kaj manipulataj de homoj. Homa penso decidas la direkton de la maŝinoj. Se rustiĝos la penso, certe rustiĝos ankaŭ la maŝino. Nur revoluciigo povas akceli agrikulturan mekanikigon rapide kaj bone.

Draŝado per maŝino



Nova Disvolvo de Industrio de Agrikulturaj Maŝinoj de Zunhua-gubernio

KIAM Vang Guofan, fame konata labormodelo en nia lando, organizis agrikulturan kooperativon kun 23 familioj de malriĉkamparanoj en 1952, la kooperativo posedis azenon je tri kvaronoj kaj estis nomata “kooperativo de senhavuloj”.

De pli ol 10 jaroj, la popolo de Zunhua-gubernio, kie laboras Vang Guofan, disvolvas la strebeman spiriton de “senhavuloj” kaj akiris certajn atingojn en disvolvado de industrio de agrikulturaj maŝinoj. Apogante sin sur la propraj fortoj, ili jam starigis 39 malgrandajn fabrikojn kaj minejojn administratajn de la gubernio por produkti feron, ŝtalon, karbon, metalajn produktaĵojn, kemian sterkon, cementon, ŝpinteksajon kaj manĝaĵon kaj 37 fabriketojn kaj riparejojn administratajn de komunumoj. Plejparto de la produktaj brigadoj jam starigis mem malgrandajn riparejojn kaj tiamaniere kreis kondiĉojn por mekanikigo de agrikulturo. La areo de kampoj plugataj kaj irigaciataj per maŝinoj relative plivastiĝis, kaj draŝado, flegado de plantoj, dispecigo de furaĝo kaj prilaboro de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj jam estas aŭ tute aŭ parte faritaj maŝine.

I

Zunhua-gubernio situas en la orienta Hebej-provinco. Ĝia antaŭa industria fundamento estis malbona. Antaŭ la Liberiĝo, ĝi havis nur unu

tinkturano metiejon kaj unu oleopremejon. Kvankam dum la antaŭensaltego en 1958 starigis 23 metiaj laborejoj kaj kooperativoj, tamen ili povis produkti nur ŝpatojn, pioĉojn, sarkilojn, falĉilojn kaj aliajn malgrandajn agrikulturajn laborilojn.

Post la Naŭa Kongreso de la Partio en aprilo de 1969, la tiea popolo levis altan tajdon de lernado de Daĝaj por batalakiri riĉan rikolton. Pro longa senpluveco en tiu tempo, oni urĝe bezonis irigaciajn maŝinojn, sed iuj el la pumpiloj de putoj kaj pumpostacioj ne funkciis pro difektiĝo aŭ manko de elektraj motoroj, dizeloj kaj transformatoroj; kaj la porkobredado en disvolviĝo ankaŭ urĝe bezonis dispecigajn maŝinojn por fari fermentitan nutraĵon, sed la gubernia industrio ne povis provizi tiujn maŝinojn; por konstrui kampojn de stabila alta produkto, multaj komunumoj kaj brigadoj bezonigis maŝinojn por altigi la laborefikon, sed la industria fundamento de la gubernio kaj komunumoj estis tiel mizera, ke ĝi eĉ ne povis kontentigi plenumi la riparajn laborojn por ne paroli pri kontentigo de tiuj bezonoj. La revolucia komitato de la gubernio do decidis, laŭ la urĝaj bezonoj de la agrikulturo, unue plifortigi la riparan kapablon per starigo de ripara reto de la gubernio, komunumoj kaj brigadoj por agrikulturaj maŝinoj kaj laboriloj kaj poste disvolvi paŝo post paŝo la fabrikadon de agrikulturaj maŝinoj.


Post starigo de la ripara reto, oni povas ripari agrikulturajn maŝinojn kaj laborilojn ĝustatempe en brigado mem por malgranda riparo, en komunumo por meza riparo kaj en la gubernio por ĝenerala riparo. Tio ŝparis tempon kaj elspezon kaj estas tre oportuna al la amasoj. La kunlaboro de la fabrikoj kaj riparejoj levis la kapablon de farado de maŝinmovataj instrumentoj, dank' al kio la traktoroj nun povas fosi sulkegojn, skrapi teron, pumpi akvon, draŝi grenon, transporti objektojn kaj aliajn entute pli ol 10 laborojn krom plugado, erpado kaj premado de semitaj sulkoj. En la pasinteco, la elspezoj de Hihiajing-brigado por aĉeti kaj ripari agrikulturajn maŝinojn kaj laborilojn en ĉiu jaro okupis 16 procentojn de ĝia totala enspezo. Post starigo de la propra riparejo, ĝi povas mem fari

manuzatajn agrikulturilojn kaj ripari malgrandajn kaj mezgrandajn agrikulturajn maŝinojn kaj laborilojn, la sumo elspezita tiucele reduktiĝis ĝis 2 procentoj de la totala enspezo. La komunumanoj laŭdas ĝin per jena kanto:

*La komunuma riparejo ĝustan vojon prenas:
Agrikulturon ĝi priservas per maŝinriparo,
En ĝusta tempo, senprokraste, kun monŝparo,
Kaj al amaso de komunumanoj plej bonvenas.*

La disvolviĝo de la industrio en la gubernio kaj komunumoj forte akcelas la agrikulturan mekanikigon. Nun en la gubernio jam fondiĝis tri transformatoraj stacioj, instaligiĝis pli ol 1,400 kilometroj da elektraj linioj de alta kaj malalta tensioj kaj 70% de la brigadoj en 40 komunumoj jam uzas elektron.

Elektra afinacia forno de la malgranda fera kaj ŝtala fabriko de la gubernio produktas ŝtalon.



Malanju-riparejo, kiu antaŭe povis nur ripari agrikulturajn instrumentojn, nun jam povas fabrikigi lagrojn por ĉevalĉaroj, draŝajn maŝinojn ktp. La foto montras, ke gelaboristoj faras lagrojn.




Dum la periodo de pli ol unu jaro, krom ĝustatempa riparado de agrikulturaj maŝinoj kaj laboriloj Zunhua-gubernio ankaŭ fabrikis pli ol 2,000 maŝinmovatajn agrikulturajn instrumentojn, pumpilojn kaj prilaborilojn por agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, fabrikis kaj reformis pli ol 300 ekipaĵojn inkluzive de stablaj driloj, maŝinmovataj marteloj, aerpumpiloj kaj diversaj simplaj ilmaŝinoj, dank' al kio ĝia kapablo por riparado kaj fabrikado de agrikulturaj maŝinoj estas plialtigita. Nun la gubernio jam havas 65 traktorojn kun 1966.5 ĉevalpovoj, 17 malgrandajn traktorojn kaj 14 komunumoj jam starigis sian traktoran stacion. En 1970, la meznombra pomua produktokvanto de greno de Zunhua-gubernio jam superis 250 kilogramojn.

2


La starigo de la reto por fabrikado kaj riparado de agrikulturaj maŝinoj kaj laboriloj de la gubernio, komunumoj kaj brigadoj kaj ĝia disvolvo alportis al Zunhua-gubernio brilajn perspektivojn por frua mekanikigo de la agrikulturo. Tamen, samtempe leviĝis la problemo de malsufiĉo de materialoj. Kion fari? Post prikonsiderado ili decidis starigi mem minindustrion por akiri krudajn materialojn laŭ la lokaj kondiĉoj. Sub la gvido de la gubernia revolucia komitato, disvolviĝis arda kampanjo de amasa serĉado kaj ekspluatado de mineraloj. En la mallonga tempo de kelkaj monatoj, la amasoj jam trovis pli ol 300 punktojn kiuj havas 22 diversajn mineralojn inkluzive de karbo, fero, kupro, oro, kromo, mangano, kvarco kaj kalkŝtono. La gubernio rapide konstruis plurajn malgrandajn minejojn per siaj fortoj.

La starigo de la minejoj pretigis kondiĉojn por disvolvo de metalurgio. La laboristoj de la Ĉengguan-a Kooperativa Metiejo de Ferladaĵoj, kiuj prenis sur sin la taskon de konstruado de malgranda altforno, havis nek sperton pri tiu laboro, nek teknikan scion pri produkto de gisfero, tamen, ili komencis la konstruadon laŭ sia eblo, lernante dum la laboro kaj finkonstruis ĝin en nur 90 tagoj. Kaj poste ili konstruis sammaniere malgrandan elektran afinacifornon kun kapacito de duona tuno, Bessemer-fornon kun kapacito de 2 tunoj kaj malgrandan koaksan fabrikon. Dum pli ol unu jaro, utiligante lokajn minaĵojn, oni fondis en la gubernio nombron da malgrandaj fabrikoj kaj minejoj por produktado de fero, ŝtalo, karbo, koloraj metaloj, koakso, cemento ktp kaj jam produktis 18,000 tunojn da karbo, pli ol 2,500 tunojn da koakso, 1,500 tunojn da gisfero kaj 450 tunojn da ŝtalo.



Altrapidecaj dispecigaj maŝinoj produktitaj de la gubernia fabriko de agrikulturaj instrumentoj por la kamparo

Ili mem riparas kaj fabrikas transformatorojn kaj provizas la kamparon per irigaciaj kaj drenaj maŝinoj.



En la komenco, kiam Zunhua-gubernio ekspluat-
tis karbominejojn, fandis feron kaj afinaciis ŝtalon,
granda kapitalo estis bezonata por investado kaj
la produkta kosto estis alta. Por akiri kapitalon
por disvolvi la industrion de fero kaj ŝtalo kaj fabri-
kadon de agrikulturaj maŝinoj, ili disvolvis malpe-
zan industrion.

Por utiligi la kapitalojn, ekipaĵojn, domojn kaj
teknikajn kondiĉojn de jam starigitaj metiaj labore-
joj kaj kooperativoj, la revolucia komitato de Zun-
hua-gubernio organizis ilin en malgrandajn fabri-
kojn kaj laborejojn por ke ili plivastigu sian pro-
duktadon kaj plimultigu la specojn de siaj produk-
taĵoj. Kaj krome ĝi postulis ke la guberniaj kaj
komunumaj fabrikoj ankaŭ starigu laborejojn por
produkti ĉiutagajn bezonaĵojn, sub la kondiĉo ke
ili certigu la produktadon de la antaŭe difinitaj pro-
duktaĵoj. Ekzemple, la fabriko de kotonsema oleo
produktas ankaŭ sapon, la lignaĵa kooperativo faras
ankaŭ spegulojn kaj la ŝpinteksejo fabrikas ankaŭ
kotonajn litkovrilojn el forĵetaĵoj. Samtempe kun
tio, ĝi ankaŭ organizis instruistojn, lernantojn, ko-
mizojn kaj loĝantojn por partopreni produktadon
de ĉiutagaj bezonaĵoj laŭ iliaj kondiĉoj. Ankaŭ
ĝi komisiis parton de la produktaj taskoj al komunu-
moj kaj brigadoj, por ke ili akumulu pli multan ka-


pitalon kaj per tio disvolvu agrikulturan produk-
tadon.

Zunhua-gubernio disvolvas sian malpezan in-
dustrion sinapogante sur la propraj fortoj, senĉese
plibonigis la malnovajn fabrikojn kaj metiajn koo-
perativojn kaj rapide ekfunkciigis la nove starigi-
tajn malgrandajn fabrikojn kaj laborejojn. Dank'
al fero de 9 ilmaŝinoj el malnovaj, uzitaj materialoj,
la metia kooperativo de metalaĵoj de la gubernio
plivastigis sian produkton kaj plimultigis la specojn
de siaj produktaĵoj. En la pasinteco, ĝi povis pro-
dukti nur malmultajn simplajn varojn sed nun ĝi
jam povas produkti 28 specojn de varoj inkluzive
de najloj, ŝraŭboj, fera drato, ĉiutage uzataj metala-
ĵoj kaj telefonaj fadenoj. Antaŭe la metia koope-
rativo de trikaĵoj produktis nur ŝtrumpojn, nun ĝi
produktas per malnovaj teksiloj reformitaj ankaŭ
mantukojn, littukojn kaj aliajn entute pli ol 10
specojn da varoj. La totala produktovaloro de
tiu kooperativo en la pasinta jaro superis unu milio-
non da juanoj kaj akumulis sumon de 290,000
juanoj por la ŝtato. Plejparto de tiuj malgrandaj
fabrikoj kaj laborejoj de malpeza industrio finkons-
truiĝis, ekproduktis kaj komencis akiri profiton en
la sama jaro.

4

Kiel la komunumoj kaj brigadoj povas pliigi
sian monakumulon por aĉeti pli multajn agrikul-

*Granda nombro da tuboj por pumpmaŝinaj putoj produktitaj
de la gubernia tubo-farejo per sabloŝtono kiel materialo.*



turajn maŝinojn? En sia enketado al Hiageĝuang-brigado de Tieding-komunumo la gubernia revolucia komitato konvinkiĝis ke tio estas ebla. La nomita brigado estas en montvilaĝo kun malfavoraj naturaj kondiĉoj. Antaŭ la granda kultura revolucio, oni devis fari transportadon per bovcaroj, azenoj kaj homfortoj dum la printempa semado kaj somera rikoltado, kaj la agrikultura produkta nivelo estis tre malalta. En la lastaj jaroj, ili plene utiligis la lokajn riĉfontojn, disvolvis la flankajn okupojn de trikado, bredado de silkraŭpoj, oleopremado kaj prilaborado de rizgreno kaj tritiko kaj en ĉiu jaro ĝi povas enspezi pli ol 10,000 juanojn el tiuj flankaj okupoj. Kaj per la enspezita mono la brigado aĉetis dizelojn, elektrajn motorojn, pumpilojn, dispeci-gajn maŝinojn kaj nombron da agrikulturaj instrumentoj movataj per homa aŭ bruta forto, konstruis 7 putojn provizitajn per pumpiloj kaj instalis alt-tensiajn elektrajn fadenojn. Nun ĝi fundamente kompletigis la akvoutiligajn konstruojn per instalado de maŝinoj kaj motoroj kaj akiris pliprodukton en sinsekvaj jaroj, kaj la enspezoj de la komunumanoj pli kaj pli kreskis.

En Zunhua-gubernio estas montoj kaj riveroj kiuj provizas relative bonajn kondiĉojn por disvolvi flankajn okupadojn. La lokaj kondiĉoj ebligas al la komunumoj kaj brigadoj mobilizi la amasojn por planti fruktarbojn kaj morusarbojn, bredi silk-raŭpojn kaj abelojn aŭ starigi muelejojn, farejojn de amelaj vermiĉeloj kaj fabkazeo kaj oleopreme-

jojn, entrepreni trikadon kaj prilaboradon de rizgreno kaj tritiko ktp. La kulturado de fruktarboj estas relative grava flankokupo en Zunhua-gubernio. Nun la nombro de la fruktarboj kolektive kulturataj jam nombriĝis pli ol 6,600,000 kaj la gubernio rikoltis pli ol 13,000 tunojn da fruktoj en la pasinta jaro. Kaj krome, iuj komunumoj kaj brigadoj, kiuj havis kondiĉojn, kolektive ekspluatit minojn, ne nur subtenante per tio la industriajn konstruadojn de la lando sed ankaŭ pligante la enspezon de la kolektivo. De la pasinta jaro, la minejoj funkciigataj de komunumoj kaj brigadoj enspezis pli ol 1,200,000 juanojn kaj liveris nemalmulte da mono por aĉeti agrikulturajn maŝinojn. Hipu-brigado de Gianming-komunumo, kiun gvidas Vang Guofan, nun jam havas pli ol 170 agrikulturajn maŝinojn kaj instrumentojn movatajn per homa aŭ bruta forto anstataŭ tri kvaronoj de la azeno dum la starigo de la kooperativo. Tiu brigado reformis riveron, ebenigis teron per terskrapa maŝino movata de traktoro kaj konstruis 230 muojn da Daĝaj-tipaj kampoj en unu vintro kaj unu printempo, tiel ke ĝi ricevis grandskalan pliprodukton en agrikulturo. La meznombra pomua produktokvanto de greno de tiu brigado en 1969 estis 310 kilogramoj kaj tiu de 1970 atingis 414.5 kilogramojn. Ĝoje diris ĝiaj membroj:

*Ĉe l' Granda Muro tiel multan grenon ni rikoltas,
Kvazaŭ la Sudo de Jangzi-rivero ĝin alportas.*

La paŝo-post-paŝa mekanikigo de agrikulturo akcelas la disvolvon de la produktado de greno kaj kotono. En 1970, la tuta gubernio akiris plej riĉan rikolton de kotono en la historio.





DING ŠANGUO:

Disvolvi Kulturon de Akvaj Sterkaj Vegetaloj


MI estas fleganto de akvaj sterkaj vegetaloj. En la lastaj jaroj, dank' al studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, altiĝis mia revolucia konscio, kaj vidinte la pli kaj pli grandan rolon de akvaj sterkaj vegetaloj en agrikulturo, mi ankoraŭ pli amas mian laboron.

Nelonge post kiam mi akceptis la taskon de zorgo pri akvaj sterkaj vegetaloj, mi frontis la malfacilon de trasomerado de lemno. Tiam mi estis tute sensperta kaj mi imitis la sperton de suda Giangsu prezentitan de teknikisto en la komunuma oficejo pri flego de lemno en somero. Oni diris ke trasomerado de lemno postulas malaltigon de temperaturo, mi do malaltigis temperaturon; oni diris, ke en somero oni ne devas sterki, mi do ne sterkis la vegetalon. Unuvorte, tiam mi havis nur unu ideon: Mi ne eraros paŝante laŭ spuroj de aliuloj. Sed kelkajn tagojn poste, velkiĝis la normalaj lemnoj kaj floris sur akvo mortintaj lemnoj. Kial alies sukcesa sperto malsukcesis en mia praktiko? Kun tiu problemo mi studis verkon de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ instruas: **“Kiam ni esploras la kaŭzojn de la eraroj de ni faritaj, ni trovas, ke ili ĉiuj okazis pro tio ke ni neglektis la efektivajn kondiĉojn en la donita tempo kaj donita loko kaj subjektive difinis niajn laborpolitikojn.”** Mi pensis, ke Prezidanto Maŭ instruas nin fari konkretajn analizojn al la efektivaj kondiĉoj kaj ekiri de la efektivaj kondiĉoj en donita tempo kaj donita loko. Ĉu oni ne devas tiel agi ankaŭ en lernado de alies sperto? Mi faris komparon inter la kondiĉoj de nia loko kaj la suda parto de Giangsu-provinco.

La grundo de suda Giangsu estas argilo malfacile penetrebla por aero kaj akvo, tial en somero, kiam oni sterkas la kampon, la sterkajo rapide fermentas kaj kaŭzas varmon kiu putrigas radikojn de lemno, kaj krome la argilo estas pli grasa, tial sen sterko ĝi ankaŭ povas garantii certan nutraĵon por lemno en trasomerado; sed la grundo ĉe ni estas sableca, do la afero estas tute alia. Sableca grundo estas malpli grasa kaj sen sterko lemno ne povas kreski pro manko de necesa nutraĵo; kaj sableca grundo estas tre facile penetrebla por akvo kaj aero, tial sterko povas tre rapide penetri en ĝin, sekve se oni ofte aldonas akvon en la bedojn, la sterkajo ne povas fermenti. Sen komparo mi estas malcerta, kaj post komparo kaj analizo mi estis certa kaj decidis daŭre sterki somerajn lemnojn.

Mi metis en 9 bedojn 50 kg. da sterkajo kaj post 3 tagoj mi vidis normalajn lemnojn sur la akvo. Sed en la kvina tago, okazis neatenditaĵo: la ĵus reboniĝintaj lemnoj mortis. Mi elakvigis la mortintajn lemnoj kaj vidis, ke la antaŭe grizaj radikoj nigriĝis kaj odoris mucide. La sterko estis tro multa. Mi rapide ellasis la sterkozan akvon de la 9 bedoj en 27 bedojn kaj poste malaltigis la temperaturon en la bedoj per puta akvo laŭ la sperto de suda Giangsu. Pro tiuj aranĝoj la lemnoj abundiĝis tagon post tago kaj reproduktas tiel rapide, ke en ĉiu 4-a aŭ 5-a tago mi devis elpreni certan kvan-

Ding Šanguo (meze) ekzamenas akvolaktukon kune kun kadro kaj veterana terkulturisto.



ton da lemnoj. En tiu ĉi somero, pro nia zorgema flegado kaj subteno de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado, ni rompis la rutinan difinon ke en somero oni povas nur konservi sed ne reproduktigi lemnon, kaj reproduktigis grandan kvanton da lemnoj kiu kontentigis la bezonon de agrikulturo.

Akirinte sperton en turno de konservo en reproduktigon de someraj lemnoj, ni decidis fari eksperimenton pri reproduktigo de akvolaktuko en vintro, kiam kutime oni ĝin konservis. Akvolaktuko estas pli delikata ol lemno. Ĝi havas pli rigoran postulon de temperaturo, sterko, akvo kaj sunumado, inter kiuj temperaturo estas la ĉefa kontraŭdiro. Kiel krei kondiĉojn bezonatajn de vintra reprodukto de akvolaktuko? Ni ne havas pretan varmtenan ekipaĵon, kaj decidis mem fari. Ni preparis vazojn por akvolaktuko kaj fosis bedojn sur suna deklivo. Antaŭe oni metis en bedojn kotonsemajn ŝelojn kaj poste enmetis la vazojn por altigi temperaturon. Ni ne havis kotonsemajn ŝelojn kaj intencis anstataŭigi tiujn per pajlo, sed pajlo povas nur teni varmon sed ne povas altigi varmon kaj ne povas akceli reproduktion de akvolaktuko. Por altigi la temperaturon en la bedoj, oni devas trovi taŭgan rimedon. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado aktive prezentis proponojn al ni, kiam ili aŭdis ke ni renkontis malfacilon. Iu maljuna malriĉkamparano diris: “En humida aero pajlamaso ŝimas kaj varmiĝas, ĉu ni povas meti en la bedojn miksaĵojn el bovfekaĵo, pajleroj kaj akvo por altigi temperaturon?” La propono de la malriĉkamparano nin prudentigis. Laŭ tiu ideo ni pretigis “fermantan bedon”. Kiam ekster la bedo la temperaturo falis sub nulon, en la bedo estas konservata la temperaturo por kresko de akvolaktuko.

Post la sukceso de “fermenta bedo”, ni tuj disvastigis tiun metodon en la tuta brigado kaj ĝin plie disvolvis kaj plibonigis en praktikado. Dank’ al la saĝo de amasoj kaj profunda praktikado, ni resumis la sperton kaj kreis la metodon de bremsado de fermento per aldono de akvo por malaltigi temperaturon kaj akcelo de fermento per aldono de sterkaĵo por altigi temperaturon. En ripetada praktiko en sterkado, akvumado, sunumado k.a. ni akiris kompletan sperton de vintra reprodukto de akvolaktuko.

Retrorigardante la praktikadon de sukcesoj en somera reprodukto de lemno kaj vintra reprodukto de akvolaktuko, ni konis, ke pura “konservo” ne ekzistas kaj ĝi ne konformas al dialektiko.

Efektive la t.n. “konservo” ne signifas teni lemnon kaj akvolaktukon ne kreski nek morti, sed parte kreski kaj parte morti; neniam ĉesas kresko, morto kaj metabolo. El praktikado ni konis la procedon de movado de la kontraŭdiro kaj firmigis nian decidon kaj kuraĝon en rompo de rutinaj regularoj kaj trahako de nova vojo. Ni aktive profundigis en praktikon, mastris la leĝojn, kreis kondiĉojn kaj efektivigis la turniĝon de “konservo” en “reproduktion”.

Poste ni aplikis simplajn metodojn por forigi insektojn kaj muskojn malutilajn al la akvaj sterkaj vegetaloj. Nun pli ol 180 muoj de akvejoj de la brigado estas kovritaj de akvolaktukoj, akvoĥiĉoj, akvoarakidoj (*Alternathera philoxeroides*) kaj lemnoj kaj ĉiujare la brigado povas rikolti pli ol 1,000 tunojn da akvaj sterkaj vegetaloj, kio ne nur kontentigis la bezonon de nia brigado en produkto de greno kaj kotonoj kaj porkobredado, sed ankaŭ liveris grandan kvanton da plantidoj al aliaj gubernioj kaj komunumoj.

Ding Ŝanguo esploras akvolaktukojn.



Produktejo de Tilia Mielo

EN la gubernioj Hujnan, Gingju kaj Fusong sub la montaro Ĉangbaj de la Nordoriento de nia lando troviĝas multe da tilioj. Kiam floras la tilioj, disportiĝas la aromo de iliaj blankaj floroj kiuj kovras la montojn kvazaŭ neĝo. Tiam abelbredistoj de foraj Guangdong, Guanghi, Giangsu, Ĝegiang, Henan kaj Hebej alportas tien centojn da miloj da esamenoj, kaj ankaŭ la lokanoj transmetas esamenojn en la montaron, por ke la abelaroj streĉe laboru dum la tilia florado.

Tilia mielo estas tre nutra kaj pli ol 72% de ĝi estas glikozo kaj fruktozo. En ĝi estas 16-oble tiom da vitamino-B₂ kiom en pomo kaj vinbero. Ĝi enhavas diversajn organikajn acidojn, enzimojn, biotinojn kaj aliajn substancojn kiuj povas stimuli la kreskadon kaj vivenergion de homo. Tilia mielo havas helan koloron, bonan guston kaj aparte agrablan aromon. Ĝi estas unu el la bonaj specoj de mielo.

En tempo de plena florado de tilioj, ni venis al laproduktejo de tilia mielo — Ginĉuan-komunumo de Hujnan-gubernio de Gilin-provinco. Akompanate de la estro de la revolucia komitato de la abelejo, ni vizitis abelbredistojn profunde en montoj.

Ginĉuan estas ĉirkaŭata de ĉarmaj montoj kaj klaraj akvoj. Sur la altaj montoj kreskas densaj arbaroj kaj en la baseno estas smeraldaj rizkampoj. En la klara, kratera Drako-lageto, en kiun oni enmetis fiŝidojn antaŭ 2 jaroj, nun jam naĝas 1 futon longaj fiŝoj. La estro diris al ni: "Tilio kaj pura akvo estas favoraj kondiĉoj por abelbredado. Sed antaŭe Ginĉuan estis tre malriĉa loko kaj la loĝantoj vivis mizere. Kvankam Ĉinio komencis abelbredadon antaŭ pli ol 2,000 jaroj, kaj ankaŭ Ginĉuan ekbredis abelojn antaŭ pli ol 100 jaroj, tamen je la Liberiĝo, tie estis nur 5 esamenoj, kiuj ĉiujare donis nur pli ol 50 kilogramojn da mielo. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la granda principo de Prezidanto Maŭ 'plenamplekse disvolvi produktadon kun tiu de greno kiel ĉefĉenero', plene disvolviĝis la agrikul-

turo, forstumo, brutobredado, flankokupo kaj fiŝado de Ginĉuan-komunumo. Nun la komunumo havas pli ol 1,500 esamenojn kiuj ĉiujare donas 150,000 kilogramojn da mielo kies plejparto estas tilia mielo.

Ni venis al iu abelbreda grupo kaj tie ni vidis abelkestojn bonorde vicigitajn sur sunaj deklivoj de la montoj. Abeloj hastas inter tiliaj floroj kaj abelkesto. Ni sidiĝis en densa ombro de alta tilio kaj la estro diris al ni pri la vivo de abeloj: La abelinoj estas plej diligentaj kaj laboras dum la tuta vivo. Ekde la tria tago tuj post sia elĉeliĝo abelinoj jam komencas nutri abelreĝinon kaj raŭpojn. Ili turnas nektaron en mielon kaj pretigas sian manĝaĵon per poleno. En malvarma vetero abelinoj klopodas teni varmon kaj en varmaj tagoj ili vibrigas siajn flugilojn ĉe trairejoj de abelujoj por fluigi aeron en la kestojn. Krom malmulte da abelinoj gardantaj ĉe la trairejoj de abelujoj, ĉiuj ceteraj flugas foren por kolekti nektaron. Ĉiufoje ili alportas po 30-40 miligramojn da nektaro. La distanco de ĉiu flugado estas 2-5 kilometroj kaj ili ĉiutage faras pli ol 10 tiajn flugojn. La rapideco de ilia flugo altas je 65 kilometroj en ĉiu horo. Por pretigi kilogramon da mielo, abelino devas viziti 10 milionojn da floroj.

Vespere abeloj revenis en la nestojn. Kune kun abelbredistoj ni prenis vespermanĝon. Abelbredisto Vang Ĝihong donis al ni po glason da trinkaĵo el mielo kaj eliris por flegi esamenojn. Ni demandis la estron, ĉu vespere ankoraŭ estas ia laboro. Li ridis kaj klarigis al ni, ke abelbredistoj ĉiam laboras tiel en la nokto kiel en la tago. Ekde frua printempo ili tagnokte flegas abelreĝinojn kaj faras esamenigon por elkulturi grandajn esamenojn. Kiam venas la tempo de sekreciado de nektaro, ili devas iri en profundajn montojn, ĉiutage kontroli la internon kaj eksteron de abelkesto, kolekti vakson kaj deskui abelojn, flegi abelreĝinojn kaj produkti reĝinan gelaton. Nokte ili devas gardi kontraŭ nigraj ursoj, kiuj tre ŝatas manĝi mielon kaj forŝtelas abelkestojn.

Poste la estro rakontis al ni pri abelbredisto Vang Ĝihong.

Antaŭe kamarado Vang estis nekapabla por abelbredado, sed li pensis nur pri faro de pli da kontribuoj al la ŝtato. Li modeste lernis de maljunaj teknikistoj, diligente laboris kaj neniom ŝanceliĝis pro abelpiko je liaj vangoj kaj manoj. Post kelkaj jaroj, li fariĝis tre sperta en abelbredado. Ĉiujare li vivas sep monatojn sub la ĉielo kune kun siaj kolegoj kunportante esamenojn. Spite al pluvo, vento kaj varmo ili devas tuj translokigi la esamenojn ĉu en tago aŭ en nokto; en regiono sen trafikilo ili transportas la abelkestojn per vekto tra padoj. Abelbredado ja devas kapti la floradon. Iafaĵe, por mallongigi flugadon de siaj abeloj, bredistoj kampadas proksime de floroj, eĉ se ili devas iri kelkajn kilometrojn por akiri trinkakvon. Ili scias, ke sen penado oni ne rikoltos plej bonan mielon.

La loko, al kiu ni venis, troviĝas en densa arbaro en profunda montaro. Tie trafiko estas tre malfacila kaj ne estas loĝantoj. En printempo, iuj proponis kolekti nektaron en ĉirkaŭaĵo de la komunumo, ĉar ankaŭ tie estas tilioj kaj estas facile trafiki. Sed Vang Ĝihong kaj iuj aliaj ne konsentis. Por serĉi plej bonan mielan fonton, kamarado Vang kaj liaj kunuloj trairis plurajn guberniojn, profundajn montojn kaj densajn arbarojn zorge farante esploradojn. Fine ili trovis la idealan lokon. Tie estas multe da tilioj en aĝo de 30 ĝis 80 jaroj. Vidinte tian tilion, li ekridis. Ĉiu tia arbo donas pli ol 50 kilogramojn da nektaro kio sufiĉas por unu esameno. Vang Ĝihong konvinkis la aliajn kaj alportis tien la pli ol 400 esamenojn de la bredejo. Oni antaŭkalkulis, ke 17,500 kilogramoj da tilia mielo kaj 60 kg. da reĝina gelato estos akiritaj ĉijare.

Kiam ni interparolis, Vang Ĝihong revenis. Ni petis lin rakonti al ni pri produkto de reĝina gelato. Li diris, ke reĝina gelato estas pli valora ol tilia mielo. Per ĝi oni povas kuraci dekelkajn malsanojn inkluzive hepatiton. Se oni miksas iom da reĝina gelato en nutraĵon por bovo kaj kuniklo, ili povas vivi multe pli longe kaj ilia hararo

fariĝas pli densa kaj pli glacea. Se oni injektas al kokino fiziologian solvon de reĝina gelato, la kvanto de la ovoj metitaj de ĝi povas rimarkinde grandiĝi. Reĝina gelato estas trezoro en nia Ĉangbaj-montaro. En 1963, sub la helpo de profesoroj de la Gilin-a Medicina Universitato, ili komencis produkti reĝinan gelaton. Ekspertizo de koncernaj unuoj konfirmis, ke la reĝina gelato produktita de ili estas tre bona. Ni abelbredistoj laboras tagnocte ja por fari pli da kontribuoj al la popolo per produkto de pli multe da tilia mielo kaj reĝina gelato.

En la sekvinta mateno ni forlasis la monton kune kun kamarado Vang Ĝihong. Li estis sendanta reĝinan gelaton al la Gubernia Kompanio de Lokaj Produktaĵoj. Sur la vojo li diris al ni, ke post la florado de tilio ili tuj komencos longan vojaĝon por paŝti abelojn. En frua printempo floras kolzoj kaj aprile liĉioj en Guangdong kaj Siĉuan, en majo floras robinioj en Henan kaj Hebej, de aŭgusto ĝis septembro floras laŭvice fagopiroj de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio ĝis suda parto de la lando. Floradoj de diversaj floroj sekvas unu alian; se ne estus necese ripozigi la abelojn, ili povus tutjare produkti mielon. Tiu ĉi abelbredisto, kiu vojaĝis tra la lando, firme memoras la tempojn de florado de diversaj vegetaloj. Paŝante sur la monto dense kovrata de tiliaj floroj, li diris patose: Vasta estas nia patrolando kaj ĉie aromas floroj kun nektaro. Necesas nur ke ni penu plue!

Vang Ĝihong (la dua de maldekstre) kaj laboristoj faras preparon por travintrado de abeloj.



Ĉasgrupo Daŭhia

EN la norda parto de Fugian-provinco, kie la montoj leviĝas unu super alia kaj kreskas densaj arbaroj, oni varme laŭdas la milcanan ĉasgrupon Daŭhia, kiu mortigis tri tigrojn en mallonga tempo.

Tio okazis en Ŝanĵang-komunumo de Gutian-gubernio. En iu printempo, tigro frekventis la komunumon. La ĉasgrupo Daŭhia akceptis la taskon forigi la damaĝan beston. Sub la gvido de grupestro Ĝang Jangjoŭ la ĉasistoj serĉadis en la arbaroj kaj montoj. Kiam ili venis al densa herbaro pli alta ol homo, ili rimarkis ke la herboj ŝajne estas ĵus subpremitaj de io kaj la folioj senĉese tremetas. Sperta maljuna ĉasisto asertis, ke tigro sin kaŝas nemalproksime de la herbaro.

Estas tia diro: “Atakante tigron defronte, oni malfacile evitos vundiĝon.” En tiel densa herbaro homoj ne povas vidi tigron, sed la tigro povas vidi la homojn. Je ĉiu tempo la ĉasistoj povos esti surprize atakataj de la tigro. Sed pensante pri la sekureco de la popolo, ili tute ne konsideris sian propran sekurecon. Ĉasisto Ĝang Muŝu kuraĝe iris antaŭ la aliaj. Li hakis arbeton, faris el ĝi bastonon kaj iris laŭ la tigras spuroj vigle observante. Ĝang Jangjoŭ kaj vicestro Hju Tianhoŭ iris unu dekstre kaj alia maldekstre firme tenante pafilon. La ceteraj ĉasistoj gardis en la ĉirkaŭaĵo la tigron de forkuro.

La tri ĉasistoj serĉante iris antaŭen paŝon post paŝo. Subite el herbaro elsaltis granda tigro. Ĝi firme kaptis per sia buŝo la bastonon de Ĝang Muŝu. Ĝang Muŝu aplombe antaŭenpuŝis la bastonon kaj la tigro tuj baŭmis, muĝis kaj sin ĵetis al Ĝang Muŝu kun malfermita faŭko. Tiam Hju Tianhoŭ rapide ekpafis kaj trafis ĝin je la brusto. La vundita tigro furioziĝis kaj saltegis kaj mordis en la herbaro. Ĉar la herboj estas pli altaj ol homo, la ĉasistoj ne povis celi. Tiam spritaj ĉasistoj starigis antaŭ la tigro homfiguron kaj grimpis sur apudajn arbojn. La tigro tuj sin ĵetis sur la figuron. Ĝang Jangjoŭ kaj Hje Tianhoŭ sam-


tempe ekpafis kaj trafis ĝin je la kapo. La tigro faris kelkajn baraktojn, rigidiĝis kaj falis en sangon.

Kiam la ĉasistoj triumfe revenis kunportante la mortigitan tigron, oni raportis al ili ke iu trovis tigron en la proksima brigado Linfeng. La ĉasistoj rapidis al la loko kaj vidis la tigron forkuranta. Iu ĉasisto tuj faris tri pafojn kaj mortigis ĝin.

Post mortigo de la du tigroj, la ĉasistoj atente pririgardis la teron kaj trovis spuron de granda kaj malgranda tigroj. Laŭ sperto akumulita en multaj jaroj, ili konjektis, ke la unue mortigita estas viritigro, la dua estas tigrido kaj ankoraŭ restas tigrino, kiun ili devas mortigi por la sekuro de la popolo. Ili daŭre serĉadis. Ĝuste kiel ili antaŭvidis, iunokte la tigrino enŝteliĝis en stalon de Ŝanĵang-komunumo kaj fortrenis bruton. La ĉasistoj konjektis, ke la tigrino certe revenos kaj ili atendis ĉe la pordo de porkstalo kun pafiloj. En nokta mezo, aŭdiĝis susuro kaj aperis paro da verde fosforeskaj okuloj. La ĉasistoj kune pafis sagace kaj aplombe. La tigrino furioziĝis, forkuris eksteren kaj mortis ĉe nemalproksima ŝoseo.

La informo pri mortigo de la tri tigroj rapide disvastiĝis al la montvilaĝoj en la ĉirkaŭaĵo. Oni varme laŭdis la revolucionan spiriton de la ĉasgrupo Daŭhia, kiu trairis multajn montojn por forigi malutilon por la popolo.

La ĉasgrupo organiziĝis en 1950. Tiam ĝi havis nur 15 ĉasistojn. Nun ĝi havas 28 ĉasistojn. En la pli ol 20 jaroj, la ĉasgrupo ĉasadis en Fugian kaj la Fugian-Ĝegiang-Gianghi-a limregiono, trairis pli ol 9,000 vilaĝojn de 38 gubernioj kaj municipoj. Ĝi mortigis 37 tigrojn kaj leopardojn, pli ol 10,700 aprojn, lupojn, ursojn kaj aliajn malutilajn bestojn. Krom tio ili estingis 33 incendiojn en arbaroj. La ĉasgrupo faris kontribuon en defendo de sekureco de la popolo kaj socialisma konstruado, tial ĝi estas varme laŭdata de la popolo de montregionoj kaj ricevis altan honoron donitan de la Partio kaj ŝtato.



La nove konstruita ponto super Guĵiang-rivero en Vuĝoŭ

La Navigado de Vuĝoŭ Hodiaŭ

VU JUN

VUĜOŬ situas ĉe la kunfluejo de la riveroj Higiang kaj Guĵiang en Guanghi. Ĝi estas grava rivera havenurbo en suda limregiono de Ĉinio kaj gorgo en surakva transportado de Guanghi.

MASTROJ DE LA NOVA ĈINIO

La veteranaj maristoj estas la plej bonaj atestantoj pri la ŝanĝiĝo de la naviga afero de Vuĝoŭ. Akompanate de kamarado Jang de la filio de la Naviga Administracio de Vuĝoŭ, ni vizitis veteranan mariston He Ĵong, kiu servis sur imperiistaj ŝipoj, veturis foje al Vankuvero kaj San-Francisko kaj partoprenis la fame konatan Grandan Strikon de Kantono kaj Hongkongo antaŭ la Liberiĝo.

He Ĵong nun estas jam 74-jara aĝulo kaj kvar generacioj de lia familio estas maristoj. Dum la interparolo li diris emocie: "En la malnova socio, ni maristoj estis sklavoj, sed en la nova socio ni fariĝis mastroj. Antaŭ la Liberiĝo, la kuomintangaj reakciuloj perfidis la nacion por teni sian regadon, kaj imperiistaj militaj ŝipoj tiranis ĉie, turnante la havenon de Vuĝoŭ en surteran inferon. Tiam ni eĉ ne havis rajton por vivi!" En tiu tempo, lia avo He Joŭlu laboris sur kapitalista ŝipo Hinhuahing, kiu veturis inter Kantono kaj Hong-

kongo. Foje dum ŝarĝado per rizo, li falegis kaj vundis al si la spinon. La kruela mastro eksigis lin senkompatate kaj li mortis en mizero kaj malsano. Lia patro He Huadaj eklaboris kiel maristo sur ŝipo de anglaj komercistoj, kiam li estis nur 14-jara knabo. Iutage, ĉe neĝblova Vankuvero laborestro devigis lin grimpi sur maston por laboro. Pro frosto li rigidiĝis je la manoj kaj piedoj, falis de sur la masto, rompita al si plurajn ripojn kaj mortis post du tagoj. Ankaŭ He Ĵong mem eklaboris en sia 14-jara aĝo sur fremdula ŝipo kaj same suferis de terura subpremado kaj ekspluatado.

Post la Liberiĝo, He Ĵong glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Lia filo, bofilino kaj bofilo ĉiuj fariĝis membroj de la nova generacio de navigaj laboristoj. He Ĵong, kiu emeritiĝis antaŭ dek jaroj, nun feliĉe pasigas siajn lastajn jarojn. Li diris plie: "Nun maristoj estas tre feliĉaj. La nova Ĉinio tre zorgas pri la politika kaj materia vivo de la maristoj, konstruis loĝdomojn kaj starigis kulturen palacon kaj ĉiajn bonstatigajn servojn por ili."

LA ŜIPKONSTRUA INDUSTRIO DE VUĜOŬ

Kiam ni alproksimiĝis per vaporŝipo al kajo de la Ŝipkonstruejo de Vuĝoŭ, nombro da ĵus

surakviĝintaj ŝipoj de diversaj tipoj aperis antaŭ niaj okuloj. Kamarado Li, vicestro de la revolucia komitato de tiu fabriko, rakontis al ni kiel la ŝipkonstruejo disvolviĝis. En 1958, ili finkonstruis relative avangardan transversan glitvojon, elfaris sian unuan feran trenŝipon kaj finis la senŝipkonstruan historion de Guanghi. Post la batala bapto de la Granda Proletara Kultura Revolucio, pli rapide disvolviĝas la ŝipkonstruejo. Ĝi ne nur povas fari pogrande ferajn remorkojn, trenŝipojn kaj motorajn ŝipojn kun kapacito de kelkdek toneloj ĝis kelkcent toneloj, sed ankaŭ sukcesis prove produkti la unuan porŝipan dizelon de Guanghi kun 135 ĉevalpovo. Ĝiaj ekipaĵoj estas senĉese reformitaj kaj plibonigitaj. La totala nombro de ĉevalpovo kaj la totala kapacito de la ŝipoj konstruitaj en la jaro 1970 jam estas respektive 4-oblo kaj 1.5-oblo de tiuj en la komenca periodo post la Liberiĝo de Vuĝoŭ. En 1971, ĝi mem projektis kaj konstruis ŝipojn taŭgajn por navigado en tieaj riveroj kaj varŝipojn por navigado en proksima maro.

Akompanate de la vicestro, ni rigardis la ŝipkorpan laborejon. Maŝinoj por rulpremado, kurbigado kaj tondado de ŝtalplatoj laboras kiel tajloroj tondante kaj premante ŝtalplatojn en diversformajn


pecojn por ŝipkorpa ŝelo. Iu maljuna laboristo diris al ni, ke la ekipaĵoj ĉiuj estas faritaj de la laboristoj mem. Anstataŭigante malgrandajn kaj simplajn ekipaĵojn per grandaj kaj modernaj, ili iom post iom mekanikigis la laborprocedojn kaj altigis la laborefikon je pli ol dek obloj.

Venante de la laborejo al la ŝiplito ni vidis, ke la lito estas okupata de muntata ŝipkorpo. Antaŭ tiu granda ŝelo, la argano antaŭe instalita en tiu loko sin montris tute senkapabla. Dum ni pensis en ni, kiel la laboristoj faras la muntadon, ni vidis ke kelkaj laboristoj sub direktado de iu maljuna laboristo kun aĝo de pli ol 50 jaroj bonorde kaj rapide movas la pruŝelon al la ŝiptrunko per kelkaj longaj lignostangoj kaj ilin kunigis. Vicestro Li diris al ni, ke tiu metodo estas trovita de la supredirita laboristo Jang Vejsong kune kun aliaj laboristoj. Per tiu metodo ili konstruis sur la malgranda ŝiplito relative grandan varŝipon por navigado en proksima maro.

ŜANGIĜO DE LA HAVENO

Pri la antaŭa stato de la haveno de Vuĝoŭ oni ankoraŭ bone memoras. Kiam oni prenis la mizeran havenon postlasitan de la reakciularo de Kuomintang, tie estis nur 5 lignaj trenŝipoj kun

Ŝipestro Huang Joŭ instruas navigan teknikon al juna ŝipano.




tre malgranda movforto kaj kaduka lignoŝipo kiu povis porti nur malpli ol 100 tonelojn. Hodiaŭ ĝi jam tute aliĝis. Nun sub la filia naviga administracio de Vuĝoŭ estas navigaj linioj de Vuĝoŭ supren ĝis Gujhian, Liuĝoŭ kaj lokoj ĉe limregiono de Junnan kaj Gujĝoŭ kaj de Vuĝoŭ malsupren ĝis Kantono, Hongkongo kaj Aŭmen. Centoj da feraj kaj vaporaj ŝipoj kun relative grandaj kapacitoj rapidas tage kaj nokte por subteni la industrian kaj agrikulturan produktadon. Unu vaporŝipo povas treni remorkojn kun ŝarĝo de 4,000-5,000 toneloj. La transporta kvanto de varo de tiu haveno kreskis centoble.

Homoj, kiuj faris longan vojaĝon en la malnova socio, ankoraŭ pli akre sentas la ŝanĝigon en transportado de pasaĝeroj. En la pasinteco, la riverujo de Higiang estis tre malprofunda kaj mallarĝa, kie estis sennombraj malprofundejoj kaj rapidega fluo kaj ofte okazis ŝiprompiĝo pro rifoj. Tiam la kuomintanga reakciularo tute ne zorgis pri la vivo de la popolo, ĝiaj oficistoj rabis en koluzio kun la sennombraj rabistoj ĉe ambaŭ ĝiaj bordoj per diversaj manieroj kiel postulo de pasimposto kaj eĉ mortigis homojn por forrabi varojn. Nun dank' al ordigo de la riverujo, forigo de rifoj per eksplodaĵo kaj dragado, ŝipoj jam povas navigi senbare. Laŭlonge de la naviga linio oni

ĝenerale starigis modernajn navigajn signalilojn, kiuj povas aŭtomate lumiĝi en nokto, kaj dank' al tio jam efektiviĝis nokta navigado tra la tuta linio de Higiang-rivero kaj eĉ en sezono de malabundeco de akvo oni povas rapide kaj multe transporti tage kaj nokte sur tiu linio. La laboristoj kaj servistoj sur la pasaĝeraj ŝipoj senĉese plibonigas sian servon kaj kiel eble plej bone zorgas pri la amasoj. Ĝuste kiel pasaĝeroj diris, en la malnova socio vojaĝi estis malfacile, dum en la nova socio veturante sur ŝipo oni sentas sin kvazaŭ hejme inter familianoj.

Hodiaŭ prosperas la haveno de Vuĝoŭ. Aŭtoj kuradas senĉese ĉe ĝi kiel navedoj. Antaŭe, ĉe la haveno estis krutega deklivo, sur kiu la doklaboristoj devis porti varojn per vektoj aŭ surdorse kaj tia laboro estis tre laciga kaj peniga. Nun tio jam fariĝis historia pasintaĵo. Frue, en 1958, oni jam efektivigis mekanikigon de la ŝarĝado kaj malŝarĝado ĉe tiu haveno kaj la laboro de la transportistoj multe faciliĝis. Nemalmultaj el la doklaboristinoj fariĝis ŝoforoj farantaj sian kontribuon al la socialisma konstruado de la patrolando veturigante kamionojn produktitajn de nia lando. Nun, nova moderna haveno estas en streĉa konstruado. La impone bela haveno de Vuĝoŭ aspektos ankoraŭ pli juna kaj majesta.

Parto de Vuĝoŭ-haveno



Renovigu vian abonon jam nun al

El Popola Ĉinio

por ke vi daŭre ricevu ĝin en 1972 sen interrompo. Varbo de novaj abonantoj estas petata kun dankoj. Abonantoj en landoj, en kiuj ne estas nia peranto aŭ kiuj estas nepagipovaj, sin turnu rekte al ni.

Abontarifo				
Landoj		1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Britio	£	0.50	0.75	1.00
Kanado	dol.	2.00	3.00	4.00
Japanio	enoj	320.00	480.00	640.00
Aliaj landoj laŭ la tarifo por Britio.				
Aliaj aziaj kaj afrikaj landoj	brita £	0.25	0.37	0.50
Latinamerikaj landoj	kanada dol.	1.00	1.50	2.00

Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



KRESKADO DE ŜPARDEPONOJ DE NIA POPOLO

Sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, rapide disvolviĝas la industria kaj agrikultura produktado, pli kaj pli boniĝas la popola vivo kaj kreskas la ŝpardeponoj ĝenerale tra la tuta lando. Laŭ la statistiko en la fino de aŭgusto ĉijare, la totala sumo de ŝpardeponoj kreskis je 12.2% kompare kun la komenco de la jaro, la kresko de ĉi tiu jaro estas la plej granda el tiuj de ĉiuj pasintaj jaroj kaj cetere la kresko kontinuas en ĉiuj monatoj daŭre.

Laŭ informo de la Popola Banko, la kreskado de ĉi tiu jaro havas jenajn karak-

Sekve de la disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo, nia mono kaj financo longe stabilas kaj la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj aktive deponas ŝparan monon.

terojn: unue, la kreskado okazis en ĉiuj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj senescepte; due, pliiĝis grandkvante novaj deponantoj, sole en Pekino de januaro ĝis julio la pliiĝo nombris 140,000 personojn kaj en Ŝanhajo, kies kresko de ŝpardeponoj estas la plej granda, la pliiĝo en 1969 nombris 238,000 personojn kaj en la ok monatoj ĉijare aldoniĝis 250,000 novaj deponantoj; kaj trie, la periodaj kaj senperiodaj deponoj kreskas samtempe kaj la sumo de la unua estas pli granda ol tiu de la dua.

La kreskado de ŝpardepono de popolanoj spegulas la pliboniĝon de la popola vivo kaj prosperon de la socialisma ekonomio de nia lando. La daŭra kreskado de la industria kaj agrikultura produkto, la abunda provizado de la merkato, la daŭra stabileco de la prezoj, la iom-post-ioma pliiĝo de la enspezoj de la popolanoj kaj la fakto ke nia mono sin montras kiel unu el la malmultaj stabilaj monoj en la mondo akcelis la kreskadon de ŝpardeponoj. En la nova socialisma Ĉinio, alie ol en la malnova socio, la ŝtato ne pagigas enspezimposton, la lupago de loĝejo kaj trafika kosto en la

urboj estas malaltaj, la laborŝanco estas garantiata. La brila penso de Prezidanto Maŭ "konstruu la landon laboreme kaj ŝpareme" kaj "rigore praktiku ŝparon" profundiĝis en la koro de la popolo, tiel ke la nova moro de diligenta kaj malluksa mastrumo de la hejmo kaj vivado en modesteco kaj simpleco estas plue disvolviĝinta kaj la vastaj popolamasoj memkonscie deponas siajn monojn en banko, por subteni la socialisman konstruadon de la patrujo.





MALGRANDAJ HIDROELEKTRAJ STACIOJ EN NACIMALPLIMULTAJ AREOJ

Vaste stariĝis hidroelektraj stacioj en grandaj nombroj dum lastaj jaroj en niaj nacimalplimultaj areoj. Nun, mezaj kaj malgrandaj hidroelektraj stacioj stariĝis en pli ol duono de la gubernioj kaj en nemalmultaj komunumoj kaj produktaj brigadoj en la Tibeta Aŭtonoma Regiono. En 1970 la produktita elektra energio de la tuta regiono kreskis je 100% kompare kun tiu de 1965. La Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono en la lasta vintroprintempo finkonstruis 44 novajn hidroelektrajn, tiel ke ĝia totala instalita kapacito inkluzive tiujn konstruitajn en la lastaj jaroj kreskis je proksimume 150% kompare kun tiu antaŭ la granda kultura revolucio. En Junnan, la produktita elektra energio de la malgrandaj hidroelektraj stacioj konstruitaj en la lastaj kvar jaroj superis la totalan elektrokvancon de tiuj konstruitaj en pli antaŭaj 17 jaroj. El la 128 gubernioj de la provinco, 118 konstruis por si hidroelektrajn staciojn. En la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, la nombro de hidroelektraj stacioj konstruitaj en la lastaj jaroj estas preskaŭ trioblo de tiu antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj la elektrokvanco kreskis je 75%. En la insulo Hajnan de Guangdong-provinco, multaj malgrandaj hidroelektraj stacioj estis starigitaj de malgrandaj montoriveroj ĝis la plej granda rivero Vankjuanhe en la insulo. En la areoj dense loĝataj de lioj kaj mjaŭoj, nome la gubernioj Kiongĝong, Dongfang, Ledong, Bajŝa, Ĉanggiang, Lingŝuj, Baŭting kaj Jahian, sume pli ol 400 malgrandaj hidroelektraj stacioj kun instalita kapacito de 10,000 kilovatoj estis starigitaj en la lastaj du jaroj.

La grandanombra apero de malgrandaj hidroelektraj stacioj en regionoj loĝataj

de nacimalplimultoj portis al ili grandajn ŝanĝojn. La diverslokaj elektraj stacioj ne nur servas al la agrikulturo, brutobredado kaj loka industrio, sed ankaŭ al la popola vivo.

LA SUKCESO EN DETERMINADO DE STRUKTURO DE INSULINA KRISTALO

Niaj sciencistoj sukcesis determini la strukturon de porka insulina kristalo per difrakto de iks-radioj kun distingpovo de 2.5 anstromoj. Tio estas alia sukceso post la artefarita kombino de kristala bova insulino.

Insulino estas proteina makromolekulo kun 700 atomoj kies interspaco havas nur proksimume 1.5 anstromojn (1 anstromo = 10^{-10} m.). Ĉar ĝis nun ne estas metodo por rekte observi tiel malgrandan spacan strukturon, oni uzis la metodon de iks-radia difrakto, por derivi ĝin malrekte. Post la solvo de tiu problemo la Ĉina Akademio de Sciencoj kunvokis kunsidon por ekspertizo, kiu konfirmis ke la rezulto estas fidinda kaj atingis la progresan nivelon.

APERIS LA LIBRO «HEROA KOREA POPOLO»

La libro, kiun eldonis la Popola Eldonejo kaj vendas Hinhua-librejo en diversaj lokoj, konsistas el raportoj kaj koloraj fotoj faritaj de la Delegacio de Ĉinaj Ĵurnalistoj dum ĝia vizito al la frata Demokratia Popola Respubliko de Koreio. Ĝi raportas pri la brilaj sukcesoj akiritaj de la heroa korea popolo en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, sub la saĝa gvido de la Korea Labora Partio estrata de ĝia granda gvidanto kamarado Kim Il Sen, alte tenanta la standardon de batalo kontraŭ imperiismo, disvolvanta la revolucionan spiriton de sendependeco kaj memstareco kaj penema luktado en malfaciloj. Ĝi priskribas la firman batalvolon de la korea popolo por paca reunuigo de la patrolando kaj kontraŭ la revivigo de la japana militarismo fare de la usonaj-japanaj reakciuloj kaj varme prikantas la grandan amikecon kaj batalan unuigon inter la ĉina kaj korea popoloj cementitan per sango en la komuna batalo kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj.



RIĈA RIKOLTO DE FRUKTOJ EN HINGIANG

Septembro estas la monato de fruktoj en Hingiang. La fruktobutikoj estas plenaj de akvomelonoj, hamiĝaj retmelonoj, vinberoj, pomoj kaj persikoj.

La kulturado de fruktoj en Hingiang havas longan historion, sed ĝia rapida disvolviĝo okazis post la Liberiĝo. La kulturareo de akvomelonoj kaj hamiĝaj retmelonoj plivastiĝis en la lasta jaro je pli ol 60,000 muoj kompare kun tiu antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio. La kultura areo de vinberoj en Vinbera Valo de la gubernio Turfan plivastiĝis ĉiujare kaj en la lastaj jaroj ree plivastiĝis je triono. Ĝi vere fariĝis valo plena de vinberoj kiel "verda oazo en fajra dezerto".

Ĉijare la komunumanoj de diversaj naciecoj ne nur starigis multajn novajn

Abundas vinberoj en Turfan-baseno.



fruktoĝardenojn, venkis la malfacilojn kaŭzitaĵojn de naturaj katastrofoj al frukta produkto sed ankaŭ plie aplikis sciencajn metodojn en kulturado. Por plialtigi la produktan kvanton kaj sukerentenan kvanton de fruktoj kaj melonoj, oni anstataŭigis nombron da malpli bonaj specioj per pli bonaj. En multaj lokoj oni pli multe aplikis naturajn sterkojn kaj rekrementaĵojn de olesemoj kaj ĝustamezure reduktis akvumkvanton por ke la melonoj kaj fruktoj enhavu pli altan sukerentenan kvanton.

ĈINA POŝTA AFERO EN DISVOLVIĜO

La vasta personaro de nia poŝto multe klopodis en disvastigo de la poŝto por faciligi la komunikon inter la popolamasoj. Preskaŭ ĉiuj urbetoj kaj pli ol duono de la kamparaj popolaj komunumoj havas poŝtoservon. La plejparton de produktaj brigadoj atingis la poŝta linio. Multe kreskis la poŝta laboro pri disportado de presaĵoj kaj la rapideco de transporto. Dum pli ol unu jaro pli ol 1,100 poŝtaj stacioj estis starigitaj kaj ĉ. 370,000 kilometroj da poŝtlinio estis aldonitaj en vilaĝoj de la provincoj Hebej, Junnan, Giansu, Hejlonggiang, Ŝandong, Liaŭning kaj Gilin. Kaj krome motorcikloj estas uzataj en parto de poŝtlinio, kie la vojo taŭgas por tio. En la lasta jaro estis malfermitaj 68 poŝtlinioj aŭtomobilaj kun totala longo de 14,400 kilometroj.

RIĈA RIKOLTO DE OSTROJ EN ĜUHAJ

La gubernio Ĝuhaj de Guangdong-provinco akiris riĉan rikolton de ostroj en la antaŭa duono de la kuranta jaro. La rikoltokvanto kreskis je pli ol 100% kompare kun tiu de la sama periodo de la riĉrikolta jaro 1969.

La sekigitaj ostroj produktataj en Ĝuhaj estas famaj marproduktaĵoj pro tio ke ili estas grandaj kaj bongustaj kun dika karno, kaj longe konserveblaj. La densigita suko de ostroj estas bongustigilo kun alta nutrovaloro.



TAN BAŬHIAN


Fervoja Konstruado en Du Epokoj

MI estas inĝeniero de fervoja konstruado. Antaŭ la Liberiĝo de la tuta lando mi laboris dekelkajn jarojn sur la fervojo de la malnova Ĉinio. Post la Liberiĝo mi daŭre okupas min per fervoja konstruado por la popolo. Mi vivis en du malsamaj epokoj kaj ofte sentas fortan emociion farante komparon de ambaŭ epokoj.

En la lastaj 22 jaroj, sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la fervoja konstruado de nia lando, kiel ĉiuj aliaj aferoj, akiris grandajn sukcesojn. Precipe ekde la kultura revolucio, la fervoja konstruado de nia lando akiris pli grandan disvolvon. La totala longeco de fervojoj konstruitaj en 1970 superis tiun en ĉiu ajn alia jaro post la Liberiĝo. Tio estas la plej bona rekordo en la historio de fervoja konstruado de nia lando.

En la malnova Ĉinio, sub la reakcia regado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, en la 73 jaroj ekde la konstruo de la unua fervojo, oni konstruis nur iom pli ol 20,000 kilometrojn da fervojoj de diversaj ŝpuroj kaj postigintaj teknikaj normoj, kaj cetere la fervojoj plejparte koncentriĝis en la Nordoriento kaj apudmaraj regionoj, kie la tero estas relative ebena kaj oportuna por konstruado de fervojoj. Ĉio uzita en fervoja konstruado,



kiaj reloj, ŝtalaj materialoj, ŝpaloj, cemento kaj aliaj ordinaraj ekipaĵoj, estis importita de aliaj landoj. Je konstruado de ĉiu el la fervojoj, imperi-



istoj kaj burokrataj kapitalistoj faris teruran ekspluaton al la ĉina popolo. Pere de fervojoj imperiistoj regis nian ekonomian aorton kaj prirabis niajn riĉfontojn, kio ĉagrenis ĉiun patrioton.

Post la Liberiĝo, ni ne nur riparis la ekzistantajn fervojojn, sed ankaŭ konstruis dekojn da novaj bonaj fervojoj kun la plej alta rapideco en nia historio. La totala longeco de nove konstruitaj fervojoj multe superis tiun en la 73 jaroj antaŭ la Liberiĝo. Hodiaŭ, escepte de Tibeto, ĉiuj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj jam havas fervojojn.

El la novaj fervojoj iuj iras tra altaj montoj, trans torentaj riveroj, iuj trapasas terenojn de marĉoj aŭ eterne glaciiginta tero aŭ dezerto. La konstruo de ĉiu fervojo estis tre malfacila. Tamen la vastaj amasoj de fervojaj konstruantoj disvolvis la spiriton de ĝisfunda revolucio timi nek malfacilon nek morton, venkis ardan varmon, tranĉan froston, sablan venton kaj diluvon, solvis malfacilojn kaŭzitajn de kavernoj, faŭltoj, movsabloj, ŝtonfluo ktp. En konstruado de fervojoj ili faris multajn tunelojn kaj pontojn. Antaŭ la Liberiĝo mi partoprenis en konstruado de iu relative granda fervojo en norda Ĉinio. Oni laboris 6-7 jarojn en la tempo de okupado de la japana imperiismo, sed nur finkonstruis kvinonon de la tuta linio. Sed nelonge post la Liberiĝo, ni finkonstruis la tutan



La Nankina pontego super Jangzi-rivero en konstruado

Etŝpura fervojo konstruita mem de Hinhiang de Henan-provinco forte subtenas industrian kaj agrikulturan produktadon.

linion en iom pli ol 2 jaroj kvankam tiam mankis maŝinoj. Mi partoprenis en konstruado de iu alia fervojo en la Sudokcidento de nia lando. Antaŭe iuj fremdlandaj specialistoj asertis, ke la lokoj, tra kiuj devas iri la fervoja linio, estas “neenireblaj regionoj”, kie oni ne sukcesos konstrui fervojon. Sed ĝuste en tiuj lokoj kun tre komplikaj geologiaj kondiĉoj kaj terformoj, ni fosis tunelojn, konstruis pontojn kaj sternis trakojn. Ĉar la fervojo devis iri tra densaj pontoj kaj tuneloj, la konstrua laboro estis giganta. La totala longeco de pontoj kaj tuneloj sur la linio superis 400 kilometrojn kaj multaj stacioj estis konstruitaj en tuneloj aŭ sur pontoj. Ĉe iu parto de la fervojo, la rekta distanco inter du punktoj estis nur 14 kilometroj, sed tie baris altaj montoj, krutaj rokoj kaj profundaj ravinoj. Por sterna trakojn en tiu parto, oni multe meandrigis la linion, fosis tunelojn super tuneloj kaj konstruis pontojn super pontoj, tiel ke la longeco de tiu fervoja parto atingis 43 kilometrojn. El tio ni povas vidi la gigantan kreaŭ povon de la laboristaro kaj popolo de la nova Ĉinio. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, per 7 monatoj ni konstruis grandan feran ponton super la Flava Rivero, sed en la malnova socio oni uzis plurajn jarojn por konstrui feran ponton super la Flava Rivero. La Nankina Ponto super Jangzi-rivero estas projektita kaj konstruita de nia lando mem. Ĝi estas duferdeka ponto por ŝoseo kaj fervojo kun du trakoj. La fervoja ponto longas je pli ol 6,700 metroj kaj estas kvaroble tiom longa kiom la Vuhana Ponto konstruita en 1957.

Observante en konstruado de fervojoj la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**rompi la superstiĉojn kaj liberigi la penson**”, la vastaj amasoj de fervojaj konstruantoj disvolvis la amasan movadon de teknika renovigo kaj elhakis por nia lando novan vojon de fervoja konstruado per sia propra forto. Depost la granda antaŭensalto en 1958, multe progresis la mekanikigo en konstruado. En konstruado de pontoj kaj tuneloj oni senĉese kreas kaj aplikas novajn teknikojn, diversaj modernaj komunikaj kaj signalaj ekipaĵoj estas disvastigitaj, per kio oni multe ŝanĝis la fizionomion de la fervojoj de nia lando. La disvolvo de fervoja trafiko akcelis la industrion kaj agrikulturon de nia lando, kaj la disvolvo de industrio kaj agrikulturo forte subtenis la fervojan konstruadon. Materialoj kaj maŝinoj bezonataj en la fervoja konstruado fundamente estis provizitaj de ni mem.

La fervojoj en la malnova Ĉinio estis instrumento de imperiistoj kaj enlandaj regantaj klasoj en sub-

premo kaj ekspluato al la laboranta popolo. En la socialisma nova Ĉinio, la fervojoj apartenas al la popolo kaj konstrui pli multe da fervojoj estas la komuna deziro de la popolo. Dank’ al la plena disvolviĝo de la neelĉerpebla saĝo kaj kreivo de la laboranta popolo, la konstruado de fervojoj iris pli kaj pli rapide kaj la tempo pli kaj pli mallongiĝis. Ekzemple, lastatempe ni finkonstruis fervojon longan je 800 kilometroj en nur 8 monatoj. En la konstruado ni klopodis por ne okupi agron aŭ kiel eble plej malmulte okupi agron, kaj samtempe kun tio ni riparitis vojojn, transformis kaj kreis kampojn kaj forstumis. Post lanĉo de tiu fervojo ambaŭflanke de la linio pli ol 40,000 muoj da kampoj estis transformitaj aŭ kreitaj, pli ol 1,000,000 arboj estis plantitaj. Tio estis varme laŭdata de la amasoj ĉe la linio.

En la pasintaj 22 jaroj, mi partoprenis en konstruado de dekelkaj fervojoj. Mi sentas senkomparan feliĉon kaj fieron, ke mi inĝeniero povas dediĉi mian forton al la konstruado de mia socialisma patrio. En la dekelkaj jaroj antaŭ la Liberiĝo, mi partoprenis nur en konstruo de du fervojoj, kies normo estis tre malalta kaj la skalo de inĝenerado estis malgranda. Pro la putra regado de kuomintangaj reakciuloj, malsukcesis la unua fervojo inter Nankino kaj Gianghi. La dua estis inter Hunan kaj Guanghi, sed nelonge post la finkonstruo ĝi estis detruita de la japana imperiismo. Tiam tute ne povis realiĝi mia “idealo” konstrui pli multe da fervojoj por la patrio, eĉ la persona vivo ne estis garantiata. Antaŭ la Liberiĝo mi trifoje iris en fervojajn departementojn kaj dufoje senlaboriĝis. Antaŭ la putriĝo de Kuomintango, mia koro pleniĝis de indigno kaj malkontento, mi afliktiĝis en senelirejo. En 1949 Pekino estis liberigita kaj mi akiris novan vivon. La Partio alte taksas nin teknikajn laborantojn, varme helpas nin en politiko, plene kredas kaj subtenas nin en laboro kaj ĉiuflanke prizorgas nin en la vivo. De la komenco de la Unua Kvinjara Plano de nia lando en 1953, la Partio komisiis min kiel ĉefinĝenieron en konstrudo de iuj fervojoj. Pro manko de sperto, mi ne estis kompetenta por tiu glora sed peniga tasko kaj renkontis multe da malfaciloj. Tamen, sub la lumo de la ĝenerala linio “**streĉi plene la energion, strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie**” kaj serio da principoj kaj politikoj persone ellaboritaj de Prezidanto Maŭ en socialisma konstruado, mi profundiĝis en praktikon kaj sin apogis sur amasoj, lernis de ili, senĉese resumis ilian praktikan sperton, lernis kaj spertiĝadis en


praktiko. En konstruado ofte okazis tunelaj terfaloj, obstakloj en pilieraj bazoj kaj faloj de trakbazoj. Ni laboristoj, teknikistoj kaj gvidantaj kadroj kunvenis tuj ĉe tunelaperturoj aŭ pontkapoj, faris enketojn kaj analizojn, ellaboris projektojn kaj post diskuto de amasoj ni faris urĝajn riparojn. Iu fervojo havis pli ol 4,000 spanojn, por kio uzi pontokonstruajn maŝinojn de malnova tipo estis tre danĝere. Subtenate de supera instanco, ni aranĝis kunvenon de spertaj maljunaj pontokonstruistoj, interkonsiliĝis por ellabori novan projekton de pontokonstrua maŝino, fabrikis pontokonstruajn maŝinojn de nova tipo, per kiuj ni sekure plenumis la taskon. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, amasoj partoprenis en projektado kaj reviziado de projektoj, kio malfermis vojon en projektado. Lastatempe, en projektado de iu nova linio, kadroj, laboristoj kaj teknikistoj faris en kombiniĝo pli ol 1,180 reviziojn, garantiis la glatan konstruadon, plibonigis la kvaliton de la fervojo, kaj samtempe ŝparis multe da mono kaj

materialo por la ŝtato. Sed plej grave estas, ke tio akcelis ideologian reformadon de ni teknikistoj, pli profundigis nian konon pri la vero “**amasoj estas veraj herooj**”, pli konsciigis nin en apogo sur amasoj kaj firmigis nian decidon venki malfacilojn kaj plenumi taskojn asignitajn de la Partio.

En tiuj jaroj, kiam mi akiris ian sukceson en laboro, la Partio kaj amasoj alte ĝin taksis kaj donis al mi grandan honoron. Mi estis trifoje elektita kiel reprezentanto de regiona popola kongreso kaj havis la feliĉon plurfoje vidi nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.

La kuranta jaro estas la unua jaro de la Kvara Kvinjara Plano de nia lando kaj la fervoja konstruado faris novan paŝon. Vidinte la viglan antaŭenmarŝon de la patrio, mi estis multe inspirita kaj decidis dediĉi mian tutan energion al la fervoja konstruado de nia lando sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Partio.

Ŝaŭŝan-fervojo konstruita en la Granda Proletara Kultura Revolucio



Gazetoj el Ĉinio

Pekina Revuo — politika kaj teoria gazeto, kiu propagandas Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson. Ĝi estas eldonata semajne en la lingvoj angla, franca, germana, hispana kaj japana, kaj distribuata al diversaj lokoj de la mondo per aviado.

Ĉinio — monata grandformata bildgazeto kun lakona teksto. Ĝi estas eldonata en la lingvoj ĉina, angla, franca, germana, japana, rusa, hispana, araba, hindia, indonezia, itala, sveda, korea, ŝahilia, urdua kaj vjetnama.

Ĉinio en Konstruado — monata sinteza gazeto riĉe ilustrita. Ĝi estas eldonata en la lingvoj angla, franca, hispana, araba kaj rusa.

Ĉina Literaturo — literatura kaj arta gazeto eldonata monate en la angla lingvo kaj sezone en la franca.

Popola Ĉinio — monata sinteza gazeto en la japana lingvo.


La supre rekomenditaj gazetoj nun komencis akcepti abonantojn por 1972. Varban faldfolion povas senpage ricevi ĉiu petanto.

Abonu ilin ĉe librovendejoj de via loko aŭ ĉe P.O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio.

Nova Fizionomio de Tajhang-montaro

Fotoj de Gin Dongnan

Baj Kjuansuo (la meza), laboristo de la Fera kaj Ŝtala Fabriko de Ĉangĝi, rakontas pri batalado kontraŭ la japanaj agresantoj al gejunuloj, ĉe Huangjandong, kie antaŭe funkciis arsenalo de la Okavoja Armeo kaj li laboris.




Tajhang-montĉeno serpentumas en la provincoj Ŝanhi, Hebej kaj Henan. En ĝiaj sennombraj altaj montoj troviĝas multaj riĉfontoj. Antaŭ nelonge, ni vizitis la sudorientan regionon de Ŝanhi profunde en la montaro kaj fotis fabrikojn kaj vilaĝojn, kiuj spegulas facetojn de la ŝanĝiĝo de tiu regiono.

Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito (1937-1945), la Komunista Partio de Ĉinio starigis bazlokon en Tajhang-montaro. Tiam la ĉefkomandejo de la Okavoj Armeo sidis en Vuhiang-gubernio en tiu regiono. Sub la direktado de la penso de Prezidanto Maŭ Zedong pri popola milito, la heroa popolo en Tajhang-montaro faris penan bataladon kontraŭ la japanaj agresantoj kaj kreis senmortan meriton.

Disvolvante la revolucionan spiriton de penema luktado en malfaciloj kaj sinapogo sur propraj fortoj, la popolo en Tajhang-montaro kun revolucia tradicio nun aktive disvolvas lokan industrion. Ĝi starigis feran kaj ŝtalan kombinumon kun la Fera kaj Ŝtala Fabriko de Ĉangĝi kiel la centro, forĝan fabrikon, kiu povas produkti 400-kilogramajn pneŭmatikajn martelojn, fabrikojn de bicikloj, kudromaŝinoj, lagroj, elektraj motoroj kaj traktoroj kaj teksejojn de silkaj kaj kotonaj ŝtofoj. Iuj el la produktaĵoj eĉ estas tre bonvenigataj en eksterlanda merkato. La vastaj amasoj de kamparaj komunumanoj persistas en irado de la socialisma vojo, energie entreprenas akvoutiligajn konstruojn kaj kreas kampojn de stabila kaj alta produkto per la kolektivaj saĝo kaj fortoj. La brigadoj en kiuj laboras niaj labormodeloj fame konataj tra la tuta lando Li Ŝunda, Guo Ju-en kaj Vu Hoŭli kaj la brigadoj de Nanĉeng, Linji, Nanguan k.a. akiris en sinsekvaj jaroj riĉajn rikoltojn de greno kun pomua produktokvanto de pli ol 500 kilogramoj. La tuta regiono de Tajhang-montaro fariĝos ĉiam pli riĉa kaj bela.

Komunumanoj de Nanĉeng-brigado de Ĉangĝi-gubernio, kiu atingis pomuan produktokvanton de pli ol 500 kilogramoj da greno, zorge flegas rizplantojn.






Li Ŝunda (dekstre la unua en la fronta vico) inter amaso

Laŭdingŝan, batalejo dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, nun jam havas fruktarbarojn, kiuj ĉiujare produktas 50 tunojn da pomoj.








Supre maldekstre: Milicianinoj de Fantoŭ-brigado de Hiang-juan-gubernio diligente sin ekzercas por batali kontraŭ malamikoj.

Supre dekstre: Utiligante akvofalon de sabloellasa kluzo de irigacia kanalo, Ŝiceng-brigado de Pingŝun-gubernio starigis pumpstacion kun pumpilo movata de du akvoradoj por irigacii kampojn surmontajn.

Malsupre: Ŝtupaj kampoj konstruitaj de Hiaŭdonggoŭ-brigado de Ginceng-gubernio




Maŝinoj por draŝado, dispecigo de herbo kaj elektado de semo projektitaj de la Fabriko de Draŝmaŝinoj de Ginĉeng estas pogrande produktataj kaj transportataj al kamparo.



Jang Luki, sekretario de la partia komitato de Hiangjuan-gubernio kaj reprezentanto de ĈPLA, inter komunumanoj

Laboristoj de la Fabriko de Hidrostatikaj Elementoj de Ĉanggi muntas hidrostatikan traktoron kun 40 ĉevalpovo.





La Traktora Fabriko de Ĉangĝi pogrande produktas malgrandajn traktorojn taŭgajn por uzado en montregiono.

Vej Jongfu, Sekretario de la Gubernia Partia Komitato

EN Pingguo-montregiono de Guanghi, kie loĝas ĝuangoj, jaŭoj kaj hanoj, oni ofte vidas, ke kamarado Vej Jongfu, sekretario de la gubernia partia komitato, tage laboras kune kun komunumanoj en kampo kaj vespere interparolas korverŝe kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Vej Jongfu devenis de familio de ĝuanga malriĉkamparano. Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, li estis estro de Pingguo-gubernio. Kaj post la fondo de la revolucia komitato kaj partia komitato de la gubernio, li estis elektita kiel ĝiaj estro kaj sekretario. Tiel en varmega aŭ frosta sezono kiel en neĝa aŭ pluva vetero, Vej Jongfu pasigis sian tutan tempon inter la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj kaj en la bazaj unuoj, escepte de la tempo dum kiu li kunvenis kaj lernis en alia loko aŭ en la gubernia urbo.

Li zorgas pri ĉia afero, de trinkakvo por produkta brigado ĝis vivbezonaĵoj de la komunumanoj. La amasoj laŭdas lin: "Maljuna Vej estas bona kadro tutkore zorganta pri la amasoj."


Kial Vej Jongfu tiel sin dediĉas al la bono de la amasoj? Li diris: La popolamasoj estas la fonto de la forto de la regpotenco kaj la ĉefa forto por fari la tri grandajn revoluciojn. Zorgi la amasojn ja signifas zorgi la revolucion.

Li zorgas la amasojn ne nur en ĉiutaga vivo, sed pli multe en politiko.

Foje, Vej Jongfu iris labori en Busi-brigado de Hin-an-komunumo por gajni sperton. Tuj je lia alveno, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj informis lin, ke iu kadro de la brigado

streĉe sin okupas pri akiro de materialo por konstruigi al si novan domon, kvankam li jam havas domon sufiĉe grandan, sed li tute ne zorgas malriĉkamparanon en la brigado, kies familio loĝas kunpreme en tre malvasta domo. La amasoj opinias, ke li pensas multe pri si mem kaj malmulte pri aliaj. Aŭdinte tion, Vej Jongfu sentis pezan ŝarĝon en la koro. Li pensis, ke ankaŭ li mem estas respondeca pri tio, kvankam la eraro estas farita de malsupera kadro, kvankam li ofte vizitis Busi-brigadon en la pasinteco, kaj ankaŭ havis interparolojn kun la kadroj de la brigado kaj grupoj, sed ofte nur pri produkto kaj laboro kaj tre malofte pri ideologio.

Kamarado Vej Jongfu (meze) profundiĝas en amasojn kaj modeste lernas de ili.



Kiamaniere oni povas altigi ilian konscion por plua revoluciado? Vej Jongfu kaj kadroj kune okazigis kunsidon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj petis ilin eduki la kadrojn per memorigo pri la sufero en la malnova socio kaj parolo pri la feliĉa vivo en la nova socio. Post tiu eduka kunveno iuj kadroj, kiuj ne tiel zorgis la vivon de la amasoj, pensis: La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tiel konfidis nin, dum ni zorgas nin mem pli multe ol la aliajn. Kiel maldankemaj ni estas al Prezidanto Maŭ kaj la vastaj amasoj! Ju pli ili pensis, des pli maltrankvilaj ili fariĝis. Ili esprimis kun emocio, ke ili nepre servos al la amasoj tutkore en la estonto. Vidante ke ilia konscio estas altigita, Vej Jongfu ĝojis kore kaj kuraĝigis ilin dirante: “Jes! Bagatelaj estas la malfaciloj de niaj individuoj, sed gravaj estas tiuj de la amasoj. Grava estas la liberigo de la klaso.”

En tiu kunsido, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris, ke nepino de iu bienulo eĉ diris dum kverelo kun infano de malriĉkamparano: “La domo loĝata de via familio apartenis al mia avo.” Oni diris tion al iu kadro, sed la lasta ne atentis pri tio, opiniante, ke kverelo de infanoj estas bagatelo.

Vej Jongfu pensis: Kiom da jaroj la nepino de la bienulo estas travivinta? Ŝi kredeble ankoraŭ ne naskiĝis kiam okazis la agrara reformo, kiel do ŝi povas scii la aferon de ŝia avo? Ĉu tio ne klare montras, ke la bienulo intencas konigi la historion de lia ekspluata familio al la idoj? Sed niaj kadroj rigardas tion kiel bagatelon. Kiel danĝere estas! Li diris al la kadroj signifoplene: “Se la bienuloj scias diri sian familian historion al siaj posteuloj, kial ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj ĉiuj suferis sangan ekspluaton kaj subpremon en la malnova socio, ne konigas niajn familiajn historiojn al niaj posteuloj de generacio al generacio?” La vortoj de Vej Jongfu kortuŝis ĉiujn ĉeestantojn. Kaj ili komencis varman diskuton kaj eltrovis multajn bonajn ideojn pri klasa eduko al la komunumanoj: vaste mobilizi la amasojn por skribi vilaĝan historion, familian historion kaj historion de personaj suferplenaj travivaĵoj kaj rakonti tion al la junuloj; preni la reduton, en kiu granda bienulo de tiu loko ofte enfermis kaj torturis malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn en la malnova socio, kiel “reduton por klasa eduko”; kunveni je fiksa periodo por memorigo pri la sufero en la malnova socio kaj parolo pri la feliĉa vivo en la nova socio ktp. Tiuj proponoj

ricevis varman subtenon de Vej Jongfu. Neglekta manĝon kaj dormon, li faris enketadon kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, organizis ilin rememori kaj skribi la suferplenajn historiojn de sia vilaĝo, familio kaj persono, faris klasan edukon al la komunumanoj. Ĉio ĉi tio multe altigis ilian klasbatalan konscion.

En majo de la kuranta jaro, la partia komitato kaj revolucia komitato de Pingguo-gubernio kunvokis konferencon de politika laboro de la bazaj unuoj. Tiutempe, Vej Jongfu ĵus revenis de kunveno de Bajse-regiono. Kelkaj membroj de la konstanta komitato postulis, ke li faru parolon al la kunveno. Iuj opiniis, ke por Vej Jongfu, kiu estis spertoriĉa en politika laboro de bazaj unuoj, estas facile fari paroladon pri tiu temo. Sed Vej Jongfu ne tiel opiniis. Li pensis, ke gvidanto devas propagandi Maŭzedongpenson kaj politikojn de la Partio kaj disvastigi bonajn spertojn de la amasoj en sia parolo al tiu kunveno; sed li ĵus revenis de kunveno kaj ne faris enketon, do li ne rajtas fari parolon. Por prepari sian paroladon, li invitis la kadrojn de kvar brigadoj kaj ok grupoj al kunsido, kaj serioze interparolis kun ili. Poste, li skribis zorge tekston de sia parolo pri la spertoj liveritaj de ili kaj siaj propraj komprenaĵoj pri la politika laboro en la kamparo. Poste li reviziis ĝin laŭ proponoj de tiuj kamaradoj. Kaj lia parolado, kvankam ne tre longa, donis profundan impreson al la ĉeestantaj kadroj de la kunveno. Ili diris, ke kamarado Vej donis al ili tre vivan lecionon pri lernado de la amasoj.

Vej Jongfu bone scias, ke la devo de kadro estas konduki la vastajn amasojn antaŭenmarŝi laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Kiel konduki ilin antaŭenmarŝi? El sia propra sperto Vej Jongfu komprenas, ke forto devenas de la amasoj, tial gvidanto nepre devas iri en la amasojn por trovi tipan ekzemplon kaj fari per ĝi ĝeneralan direktadon.

En majo de 1970, Vej Jongfu venis kun tiu problemo al la produkta grupo Dantaj de Fengvukomunumo por fari enketadon. Tiu grupo konsistanta el 8 familioj havas 13 laborkapablajn membrojn, kiuj ĉiuj estas jaŭoj loĝantaj ĉe montotalio. Oni diris, ke la homoj de Dantaj estas malriĉaj, ĝiaj kampoj malfekundas kaj sur la alta monto mankas kulturebla tero, do ĝi estas netransformebla. Sed la membroj de Dantaj-grupo tute ne deprimiĝis. Ili elmetis la bravan sloganon: La ok familioj ankaŭ faros fundamentan konstruadon de kampoj kaj batalos kontraŭ la montoj por akiri grenon! En la amasa movado de lernado de Daĝaj, heroe



Kamarado Vej Jongfu laboras kune kun ĝuŭangaj kaj jaŭaj komunumanoj agante samtempe kiel komandanto kaj batalanto.

ili hakis rokon por konstrui akvobasenon kaj kampojn. En duona jaro, ili konstruis akvuĵojn kun kapacito de 500 kubmetroj kaj 3.5 muojn da irigaciataj kampoj kaj plantis rizon sur alta monto.

Alveninte al Dantaj, Vej Jongfu tuj iris kun la estro de la produkta grupo Vu Ĉengcaj trans montojn por vidi la akvuĵojn kaj rizplantojn sur kampoj nove konstruitaj de ili. Ili pririgardis kaj interparoladis dum irado. Vu Ĉengcaj diris: “Dum lernado de la granda instruo de Prezidanto Maŭ ‘Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn’, la komunumanoj tre ekscitiĝis. Ili diris: Ĉu la pli ol 40 homoj de niaj ok familioj ne povas ŝanĝi la fizionomion de la produkta grupo, se ni unuiĝos kaj pene luktos kontraŭ malfaciloj? La vortoj de ili lumigis ankaŭ mian penson: por ŝanĝi la fizionomion de Dantaj, la pli ol 40 homoj de nia grupo devas bone unuiĝi kaj pene lukti kontraŭ malfaciloj!” La vortoj de Vu Ĉengcaj profunde kortuŝis Vej Jongfu. Li vidis, ke ne nur troviĝas avangarda unuo sur la ebenejo, sed ankaŭ troviĝas modela kolektivo en la montregiono. Konstruado de la montregiono devas esti farita de tiea popolo.

Vej Jongfu tuj proponis al la partia komitato de la gubernio, ke ĝi venigu kadrojn de la produkta

grupo Dantaj al la gubernia urbo kaj komunumoj por raporti en diversaj kunvenoj siajn komprenojn en studo de Maŭzedongpenso, por ke ilia revolucia spirito de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj disvastiĝu tra la tuta gubernio.

Unu Dantaj marŝas en la fronto, kaj granda nombro da “Dantaj”-oj ĝin sekvas. Sub la impulso de Vej Jongfu, ankaŭ la aliaj ĉefaj membroj de la partia komitato kaj revolucia komitato de la gubernio trovis kaj elkulturis nombron da avangardaj kolektivoj en konstruado de la montregiono kun la spirito de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj kaj entuziasme resumis kaj disvastigis la avangardajn spertojn.

Sub la gvido de la gubernia partia komitato, la vastaj amasoj de komunumanoj en la montregiono pene laboris kaj ĝojinda ŝanĝo okazis al la fizionomio de tieaj komunumoj kaj brigadoj somere de la kurranta jaro. Maizo, sorgo kaj aliaj grenplantoj sur neirigaciataj kampoj ĝenerale havis riĉan rikolton kaj la totala produktokvanto de greno kreskis je pli ol 20 procentoj ol tiu de la pasinta jaro.

Feliĉaj Laboristinoj de la Nova Ĉinio

IUTAGE, ni venis en la Ŝenjang-an Lanan Ŝpinteksejon de Liaŭning-provinco kaj vizitis ĝian infanvartejon.

INFANOJ EN SANA KRESKADO

En la oficĉambro de la estrino, ni intervidiĝis kun kamaradino Vang Enhiu, kiu laboris jam 15 jarojn kiel estrino de la vartejo. Antaŭ ĉio, ŝi konigis al ni ĝian ĝeneralan staton.

La vartejo estis starigita tuj post la Liberiĝo. Ĝiaj pli ol 60 vartistinoj kaj unu kuracisto vartas pli ol 500 infanojn. Oni povas laŭbezone elekti tagan aŭ tagnoktan vartadon por siaj infanoj. Laŭ la aĝoj de la infanoj, la vartejo starigis grupon por unujaraj suĉinfanoj kaj grupojn A, B, C. La patrinoj ĉiutage povas mamnutri sian bebon trifoje en sia 8-hora labortempo. Laboristinoj, kiuj plenumas noktan deĵoron, ĉiam ajn povas sendi sian infanon al la vartejo por bone ripozi tage en sia domo. La ŝtato pagas duonon de la kuraca elspezo por la infanoj kaj varta elspezo de ĉiu infano okupas nur 6% de la salajro de ordinara laboristino.

Ektuŝinte tiun punkton en sia parolo, la maljuna estrino entuziasme diris al ni: “Unu vido taŭgas pli ol cent aŭdoj. Do iru por rigardi propraokule!” Gvidate de ŝi, ni vizitis dormejojn, ludoĉambrojn, mamnutrejon, kuracejon kaj manĝejojn de la infanoj. . . Ĉie regis pureco kaj freŝeco, kio montras la diligentan laboron de la

vartistinoj kaj forte impresis nin. Kamaradino Vang diris ke post la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vartistinoj diligente studas kaj aplikas Maŭzedongpenson, multe levis sian politikan konscion kaj starigis al si la penson tutkore servi al la popolo. Nun ili faras hartondadon, banadon kaj lavadon de urinaj tukoj eĉ al la tage vartataj infanoj. Kiam ni petis vartistinon Ki rakonti pri sia laboro, ŝi diris: “Mi tre amas mian okupon. Se nia laboro estas bone farita, tio ebligas al la patrinoj pli energie teni revolucion kaj stimuli produkton, kaj fari pli multe da kontribuoj al la revolucio. Ĉu nia banala laboro ne estas strikte ligita kun la tuta revolucia afero?”

En la ludoĉambroj de A-grupo kaj B-grupo, infanoj viglaj kaj amindaj kelkope faras gaje diversajn amuzojn sub direkto de vartistinoj. Iuj dancas kaj aliaj lernas kanti elektitajn strofojn el modelaj revoluciaj pekinoperoj. Ilia naiva prezentado kaj variaj mienoj de ĝojo kaj indigno impresis nin profunde.

AKRA KONTRASTO INTER LA DU SOCISISTEMOJ

Ĉeng Kihian, maljuna laboristino de la tinktura kaj ordiga laborejo, nun preskaŭ 50-jara, eklaboris en la fabriko jam antaŭ la Liberiĝo. Ŝi rakontis al ni sian travivaĵon.

En 1939, pelate de vivo ŝi venis al la Ŝenjang-a Lana Ŝpinteksejo (tiam nomata la Manĉuria kaj

Li Fengkin
(dekstre) en
laborejo



Mongolia Lanteksa Kompanio) kaj eklaboris kiel laboristino. Sub la regado de la japanaj agrosantoj, la ĉinaj laboristoj kiel sklavoj baraktis kontraŭ morto. Tiam cirkulis jena kanto pri la mizera vivo de laboristinoj:

*Popolo diras: “Tre amaras ja koptid’.”
Sed vivo de laboristinoj multe pli.
Eĉ edziniĝon ili timas nur pro ke
Elpelos ilin la fabrik’ pro gravediĝ’.*

En la malnova Ĉinio, edziniĝo signifis senlaboriĝon kaj akuŝo—krimon. Antaŭ la Liberiĝo, Ĉeng Kihian naskis tri infanojn, el kiuj du mortis tro frue kaj la alia estis kripla. Laŭkutime, estis ĝojinda afero, ke Ĉeng Kihian gravediĝis je la unua infano, sed en la malnova socio, tio portis al ŝia familio malfeliĉon. Je gravediĝo de pli ol 5 monatoj, ŝi estis maldungita de la kapitalisto pro tio ke ŝi malobservis la “regularon de la fabriko”. Nur post la nasko de la bebo, kaj dank’ al multa

helpo de siaj parencoj kaj amikoj, ŝi reakiris laboron en la fabriko. Sed tage ŝi ne povis reveni al sia hejmo por mamnutri la bebon. Foje ŝia bopatrino portis al ŝi tagmanĝon kun la bebo de kelkaj monatoj, Ĉeng Kihian transprenis la bebon por ĝin mamnutri, sed tion rimarkis iu japana laborestro. La lasta ĝin deprenis kaj forjetis ekster la pordon. La infano ne ricevis mamnutradon sed la patrino ricevis pezajn batojn . . .

Kiam la mizeraj tagoj venos al sia fino!

En novembro de 1948, kiam Ŝenjang estis liberigita, Ĉeng Kihian kaj la aliaj laborantaj popolanoj fariĝis mastroj de la ŝtato. Parolante tion, ŝi emocie diris: “Post la Liberiĝo, mi naskis kvar infanojn, ili ĉiuj kreskis en la vartejo. Nun iuj el ili jam havas sian laboron.”

En 1951, kiam Ĉeng Kihian naskis infanon, ŝi suferis de tuberkulozo pro mizera vivo en la

malnova socio. La gvidantoj tuj sendis ŝin al sanatorio de Kingdaŭ por kuraco. Oni portis ŝian bebbon de malpli ol unu monato al la vartejo por ke vartistinoj ĝin zorgu atente. La ŝtato pagis la tutan elspezon por ŝin kuraci. Kiam ŝi revenis al la fabriko post resaniĝo, ŝia korpopezo kreskis de pli ol 35 kg. ĝis pli ol 60 kg.

Kamaradino Ĉeng ĝoje diris al ni: En la pasintaj pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo, la pozicio de ni laboristinoj en la nova socio leviĝas senĉese. La laboristinoj, kiel la laboristoj, ĉiutage laboras 8 horojn, ricevas saman rekompencan por sama kvanto da laboro. En laborejoj instaligis aeruma kaj senpolviga ekipaĵoj kaj kuracejo. Laboristoj ricevas malsamajn kitelojn laŭ la laborspeco kaj ĝuas senpagan kuracon. Se iu bezonas ripozon pro malsano, la ŝtato ne reduktas lian salajron. Por akuŝo laboristinoj ricevas libertempon de 56 tagoj kaj plenan salajron.


La politika pozicio de laboristinoj estas rimarkinde levita. Nun la virinaj partianoj okupas 40%

de la totala partiano de nia fabriko. La sekretarioj de la partiaj filioj de 5 el la laborejoj estas laboristinoj. 50 procentoj de la gvidantoj en la partia komitato, la revolucia komitato kaj laborejoj estas virinoj. Vu Jakin, maljuna laboristino de la lanklasifika laborejo, kiu estis infanbofilino antaŭ la Liberiĝo, nun estas estrino de la laborista kongreso de la fabriko kaj vicestrino de la laborista kongreso de la Ŝpinteksa Buroo de Ŝenjang.

KREI PLI MULTAJN RIĈAĴOJN POR LA SOCIO

Prezidanto Maŭ montris: **“Fariĝis alia epoko, viroj kaj virinoj estas egalrajtaj. La aferon, kiun kamaradoj povas fari, ankaŭ la kamaradinoj povas.”** Pri tio ni havas pli profundan komprenon dank’ al tiu vizito. Hodiaŭ, la laboristinoj sin tenas kiel mastroj ne nur en politiko kaj ekonomio, sed ankaŭ ne plu ĝenas sin pro la infanoj en la lernado kaj laboro.

Infanoj de la infanvartejo en ludado





La familio de Ĉeng Kihian (la tria de dekstre)

Dum nia vizito, kamaradino Vang kaj vartistinoj prezentis al ni progresemajn aktivadojn de patrinoj de multaj infanoj en teno de revolucio kaj stimulo de produkto. Inter ili sin trovas Li Fengkin.

Ŝi havas tri infanojn, du el kiuj nun ankoraŭ estas en la vartejo. Ŝi estas ŝpinistino. De multaj jaroj ŝi neniam forlasis sian laboran postenon eĉ unu tagon pro sia infano kaj ĉiam akurate venas al sia deĵoro ĉu tage aŭ nokte. Kune kun aliaj kamaradoj de la laborejo ŝi studas kaj aplikas Maŭzedongpenson, faras teknikan renovigon kaj senĉese faras novan kontribuon por la revolucio. En junio de la kuranta jaro, la gvidantoj postulis, ke ilia laborejo pligrandigu produktadon de orlonaj pufaj fadenoj, garantianta la plenumon de la normala produkta tasko. Tiam mankis por tiu nova tasko bezonataj personoj kaj ekipaĵoj. Kion fari? Ĉu ili petu de la ŝtato personojn kaj ekipaĵojn, aŭ venku la malfacilojn per siaj propraj fortoj? Laŭ sia sperto akumulita en la laboro de pli ol 10 jaroj, Li Fengkin kuraĝe proponis mallongigon de la teknologia procedo de orlonaj

dikaj pufaj fadenoj. Dank' al ilia komuna klopodo, la pasintaj kvar procedoj reduktiĝis en unu procedon, kio ne nur ŝparis homforton kaj ekipaĵojn, sed ankaŭ duoble altigis la laborefikon.

En la mamnutrejo, ni interparolis kun laboristinoj mamnutrantaj infanojn. Teksistino Kiu Ĝihua havas du infanojn. La bona flegado de la vartejo ebligis al ŝi koncentri sian energion por studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj teknikon. Nun ŝi jam estas sperta teksistino kun alta politika konscio. De januaro ĝis aŭgusto de la kuranta jaro, ŝi teksis pli ol 20,000 metrojn da kemifibra lanŝtofo, kies 98% estas de la unua klaso. Laboristinoj ĉiuj volas lerni de ŝi.

Tiu fabriko plenumis la produktan planon de la ŝtato por 1970 antaŭdate je 4 monatoj kaj 6 tagoj. Kvankam la ĉijara produkta tasko pliiĝis je 60 procentoj kompare kun tiu de la pasinta jaro, tamen ĝi ĉiumonate superplenumis la planon. La brila sukceso en la produkto plene manifestis la gravan rolon ludatan de la vasta laboristinaro en kreado de socia riĉaĵo.



Prezenta inaŭguro de la Korea Pjongjang-a Naci-opera Trupo je vizito al Ĉinio

Solena Prezenta Inaŭguro de la Korea Pjongjang-a Naci-opera Trupo en Pekino

EN la 28-a de septembro, laŭ la invito de la Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj, la Korea Pjongjang-a Naci-opera Trupo el 350 personoj atingis Pekinon sub la gvido de trupestro Sin In Ha, vicprezidanto de la Komitato por Kulturaj Rilatoj kun Aliaj Landoj de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio. La amika vizito de la delegitoj de la korea popolo alportis al ni profundan revolucionan amikecon de la frata korea popolo kaj eminentan arton, kio tre ĝojigis la popolon kaj literaturajn kaj artajn laborantojn de nia lando. Dum tiu ĉi vizito la koreaj artistoj prezentos al la ĉina popolo grandan revolucionan operon *Maro de Sango*.

Vespere de la 2-a de oktobro, la prezentado de la trupo solene inaŭguriĝis en Pekino.

Vu De, estro de la Kultura Grupo de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio kaj Sin In Ha, estro de la trupo kaj vicprezidanto de la Komitato por Kulturaj Rilatoj kun Aliaj Landoj de Koreio faris

parolojn ĉe la inaŭguro. Ili ambaŭ laŭdis la senĉesan kreskon kaj firmiĝon de la batala amikeco formita el sango inter la popoloj kaj revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj de Ĉinio kaj Koreio, intime zorgata kaj kulturata de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj la granda gvidanto de la korea popolo Ĉefministro Kim Il Sen.

Kamarado Vu De diris, ke sub direktado de la revolucia literatura kaj arta penso de sia granda gvidanto kamarado Kim Il Sen, la koreaj revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj kreis multajn eminentajn verkojn kombinantajn revolucionan batalan enhavon kun nacia formo, tiel ke la literaturo kaj arto fariĝis efika armilo por kuraĝigi kaj eduki la popolon per la glora revolucia tradicio kaj komunisma spirito. La *Maro de Sango* prezentota de niaj koreaj kunbatalantoj estas eminenta verko kun tia karaktero. Ĝi profunde spegulas la grandan revolucionan faron de la korea popolo en kontraŭjapana armita batalo, prikantas la sentiman

heroismon kaj malcedeman batalspiriton de la korea popolo en rezisto kontraŭ agreso kaj batalo por sendependeco kaj liberiĝo de la nacio.

Li diris, ke nun la popoloj de Ĉinio kaj Koreio kune batalas kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj en revivigo de la japana militarismo. La prezentado de la opero *Maro de Sango* en Ĉinio havas gravan signifon por plua firmigo de batala amikeco inter la ĉina kaj korea popoloj en unuiĝo por oponi kontraŭ malamikoj. Kamarado Vu De diris, ke en la komuna batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj japana militarismo, la ĉina popolo ĉiam unuiĝos, batalos kaj venkos kune kun la korea popolo.

Trupestro Sin In Ha diris, ke la prezentado de la korea revolucia nacia opero *Maro de Sango* faros kontribuon por plia firmigo de la nerompebla batala amikeco formita el sango inter la popoloj kaj literaturaj kaj artaj laborantoj de ambaŭ landoj

kaj por plia disvolvo de la tradicia amika kunlaborado kaj kultura interŝanĝo.

Li diris, ke sub direktado de la ideo *ĝuĉe* de la granda gvidanto kamarado Kim Il Sen, la korea literaturo kaj arto floras pli bunte. Nun, observante la batalan programon elmetitan de la Kvina Kongreso de la Labora Partio, la popolo kaj literaturaj kaj artaj laborantoj de Koreio faras obstinan batalon por akceli plenan venkon de socialismo kaj sendependecon kaj pacan reunuigon de la Patrio, por firme oponi kontraŭ kultura penetro de imperiismo kaj tendenco de reveno al la antikveco, kaj por plue disvolvi la socialisman nacian kulturon.

Post ilia parolo, la Ĉina-Korea Amika Asocio, la Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj la Korea Pjongjang-a Naci-opera Trupo donacis reciproke silkan flagon. Post la inaŭguro la trupo prezentis la operon *Maro de Sango*, kiu estis varme bonvenigata de la spektatoroj.



Nova Malgranda Pasaĝero en Vagonaro

ESTIS la 11-a antaŭtagmeze de la 18-a de majo, 1971. La ordinara pasaĝera vagonaro 204 forlasis Kunming de Junnan-provinco kaj galopis tra montaro sur la Junnan-Gujŝoŭ-a Altebenejo.

Fininte sian laboron en la pakajvagono, konduktorino Ĉen Dingĝaŭ venis en la vagonon n-ro 1. Ŝi tuj rimarkis, ke la frunto de iu kamparanino plenas je ŝvito kaj ŝia mieno spegulas maltrankvilon kaj embarason. Per plua rigardo ŝi konstatis, ke la virino estas graveda kaj tuj akuŝonta.

La virino nomiĝas Jin Kjongĝen. Ŝi estas membro de Dianvej-brigado de Dunĵen-komunumo. Ŝi estis revenanta de Kunming post vizito al sia parenco, kaj pro skuado sur la vojo fruiĝis la akuŝa tempo.

Ĉen Dingĝaŭ senhezite helpis la virinon iri en la pakajvagonon, sternis lankovrilon por ke ŝi kuŝiĝu kaj poste ŝi tuj rapidis al la estro de la partia grupo de la vagonaro por raporto.

Aŭdinte ŝian raporton, la partia grupestro kaj vagonarestro Hjun Zupej diris, ke ŝi tuj reiru al la paciento por ŝin prizorgi, kaj kunvokis urĝan kunsidon de la konduktoj. Ĉiuj unuanime esprimis, ke la popola vagonaro devas servi al la popolo kaj ili faros ĉion eblan por garantii la sekurecon de la patrino kaj infano.

La pasaĝeroj en la vagonaro tuj informiĝis pri la akuŝonta virino tra la disaŭdiga sistemo. Unu kuracisto de ĈPLA kaj unu laborista kuracisto venis

en la pakajvagonon por helpo. Ne malmultaj pasaĝeroj montris sian prizorgon per dono de siaj manĝaĵoj kaj higienaj bezonaĵoj al la akuŝantino. Por antaŭgardi kontraŭ eventuala akcidento, kondukto sciigis al la atingota stacio, ke oni faru preparon por urĝa helpo. Kaj tiu stacio siavice telefone avertis la najbaran stacion...

Dank' al la flegado de la kuracistoj kaj konduktoj, sekure naskiĝis la bebo. La vagonarestro dankis la kuracistojn en la nomo de la patrino kaj la konduktoj kaj demandis al ili, kiel ili nomiĝas. Sed neniu el ili volis konigi sian nomon. Ili nur humure diris montrante al la bebo:

“Jen, alvenis nova malgranda pasaĝero al nia vagonaro!”

Galopas la Mil-lia Ĉevalo

— Vizito al la ŝtaluzino Gangsen

Nia aŭto forlasis Pjongjangan kaj veturis laŭ la ombra ŝoseo al Nampo. Post 40 minutoj ni vidis modernan industriaran urbon antaŭ ni: altaj fumtuboj skrapas la ĉielon kaj dense viciĝas majestaj fabrikanj domoj. Jen estas la fama ŝtaluzino Gangsen de Koreio.

La ŝtaluzino Gangsen estas fiero de la korea popolo. Ĝi ne nur iris gloran kaj malfacilan vojon de sinapogo sur la propraj fortoj sub la saĝa gvido kaj zorgado de Ĉefministro Kim Il Sen, sed ankaŭ estas la naskiĝloko de la movado de mil-lia ĉevalo. La laboristoj de tiu ŝtaluzino estas la iniciatintoj de la movado de laborgrupoj de mil-lia ĉevalo kaj kreintoj de la "Gangsen-rapideco".

Kiel la ŝtaluzino pene luktis kaj venkis malfacilojn sin apogante sur la propraj fortoj? Kaj kiel ĝi ascendis la mil-lian ĉevalon kaj brave rapidis antaŭen tra obstakloj?

Kiam ni vizitis tiun ŝtaluzinon, ĝiaj gvidantoj kaj laboristoj detale prezentis al ni la grandajn ŝanĝiĝojn de tiu uzino post la liberiĝo.

Antaŭ la liberiĝo, ĝi estis fabriko malgranda kaj nekonata. Post kiam la japanaj imperiistoj estis forpelitaj, la popolo fariĝis la mastro de sia lando kaj la ŝtaluzino Gangsen komencis sian novan vivon. En duona jaro, la laboristoj jam sukcesis restarigi la varmigan fornegojn kaj komencis produktadon. En 1947, la jara produktokvanto jam atingis pli ol 2.5 oblojn de tiu sub la regado de la japana imperiismo kaj en 1949 7 oblojn.


En 1950, la damninda usona imperiismo lanĉis la agresan militon kontraŭ Koreio kaj la ŝtaluzino estis tute ruinigita.

Post la ĉeso de la milito, la laboristoj de tiu uzino spertis severan provon. Parolante pri la rekonstruo de la uzino post la milito, la mastro kondukis nin al la poplo en la uzino. Montrante al la poplo li diris: "Ĝi ne submetiĝis sub la freneza bombado de la usona imperiismo. Same kiel la heroo popolo de Koreio, la obstina poplo trapasis la provon de la milito kaj staras fiere. En aŭgusto de 1953, Ĉefministro Kim Il Sen venis al la ŝtaluzino Gangsen. Ĉar la fabriko tute detruita eĉ ne havis lokon por ripozo, li do sidiĝis sur ŝtono sub la poplo kaj interkonsiliĝis kun laboristoj pri restarigo de la uzino." Kuraĝiĝite de la vortoj de la Ĉefministro, la laboristoj akiris senfinan energion. Ili brave ekagis kun forta malamo al la usona imperiismo, plenigis pli ol dekmil bombokavojn, riparigis pli ol 30,000 mekanikajn ekipaĵojn kaj post 40 tagoj ili jam produktis la unuan furnon da ŝtallikvo.

En la jaro 1956, la situacio en- kaj ekster-landa estis tre komplika. La usona imperiismo senĉese provokis la nordan parton de la respubliko dum enlande la kontraŭpartiaj sektistoj deziris ekagi. Ĝuste en tiu tempo, Ĉefministro Kim Il Sen refoje venis al la uzino je la 28-a de decembro spite al frostoj kaj neĝblovo, intime interparolis kun laboristoj ĉe elektra fornego kaj laminatilo, analizis la situacion kaj kuraĝigis ilin levi altan

tajdon de la movado por pliprodukto kaj ŝparo kaj impeti antaŭen kun la rapideco de ĉevalo kiu povas kuri mil liojn en ĉiu tago. La alvoko de Ĉefministro Kim Il Sen multe kuraĝigis la laboristojn de la tuta uzino. Ili brave elmetis la sonoran sloganon pliprodukti 10,000 tunojn da ŝtalaĵoj. Por plenumi tiun taskon, oni nepre devas altigi la produktan kapablon de la blumingo. La produkta kapablo de la blumingo de tiu laborejo estis 60,000 tunoj laŭ projekto kaj post reformo ĝi estis altigita ĝis 80,000 tunoj. Sed la laboristoj ne kontentiĝis je tiu atingo. Por produkti pli multe da ŝtalaĵoj por la ŝtato, ili decidis ankoraŭ pli altigi ĝian produktan kapablon je 10,000 tunoj. Tiam iuj konservativuloj diris, ke la altigo ĝis 80,000 tunoj estas miraklo kaj estas tute neeble ankoraŭ pli altigi tiun kvanton je 10,000 tunoj. Sed sub la subteno kaj kuraĝigo de kamarado Ĉefministro, la laboristoj eklaboris kun ĝisĉiela entuziasmo. Ili faris sciencon analizon al ĉiu produkta procezo. Antaŭe la blumingo povis produkti 14 tunojn en ĉiu horo. Se la aktiveco de la laboristoj estas plene elvolvita kaj incidentoj malpliigitaj, oni povas altigi la horan produktokvanton ĝis 16 tunoj kaj tiamaniere multe altiĝos la produktokvanto. La laboristoj firme decidis pli bone protekti la ekipaĵojn, mallongigi la tempon por ĝenerala riparo, altigi la laboran produktivon por produkti 90,000 tunojn. Por atingi tiun celon, la laminatistoj dormis kaj manĝis en la laborejo. Ili venkis unu post alia malfacilojn per kolektiva saĝo.

En la sekvinta tago post la komenco de la batalo, subite obstrukcita estis la fumtubo de la varmiga forno. La fajro rimarkinde malfortiĝis, kio malbone influis la produkton de la blumingo. Laŭ la malnova regularo, oni povis komenci forigon de la obstrukcaĵo en la fumtubo nur post estingo de la fajro. Tia faro malŝparos multe da tempo. Kion fari? Han Il Po, membro de la Korea Labora Partio, kuraĝe elmetis la proponon forigi la obstrukcaĵon per vaporo. Enblovi vaporon al la fumtubo probable kaŭzos eksplodon. Sed anstataŭ sian personan sekurecon, Han Il Po zorgis nur produkton de pli multe da ŝtalaĵoj por la ŝtato. Nokte, Han Il Po faris preparon kontraŭ eksplodo kaj jam pretis eniri en la fumtubon kun vapora tubo por plenumi la danĝeran taskon. En tiu momento, la grupestro alrapidis, lin tirante diris: “Vi estas ankoraŭ juna kaj povos fari pli multe ol mi, do lasu tion al mi...” Han Il Po premis la manon de la grupestro kun emociaj larmoj en la okuloj kaj longe ne povis paroli. Fine ili forigis en komuna klopodo la obstrukcaĵon




6,000-tuna hidraŭlika premilo fabrikita de la korea laboristaro en forĝado (el la bildgazeto Koreio).

sen estingo de la fajro kaj garantiis la produktadon. Poste ili faris serion da teknikaj renovigoj, kio multe altigis la produktokvanton de la laminatilo ĝis 100,000 tunoj. Je la fino de 1957, ili impete levis ĝin ĝis 120,000 tunoj. Tiu impeto donis bonan ekzemplon al la tuta uzino kaj la tuta lando, kaj la antaŭenmarŝa klariono de mil-lia ĉevalo sonoris tra la norda parto de la respubliko.

Disvolviĝis la movado de mil-lia ĉevalo kaj antaŭenmarŝis la ŝtaluzino Gangsen. En marto

de 1959, la laborgrupo de Ĝin Eng Un de la elektra fornego n-ro 3 de la ŝtalfandejo faris alvokon al la tuta lando por disvolvi movadon de laborgrupo de mil-lia ĉevalo kaj antaŭenpuŝis la movadon de mil-lia ĉevalo al nova etapo. En la movado de laborgrupo de mil-lia ĉevalo, la produkto de la ŝtaluzino ĉiam disvolviĝis kun alta rapideco. La homoj de Gangsen senĉese progresas, ili aparte atentis pri kulturo de kolektivismo, senĉese batalas kontraŭ malnovaj ideologioj, reviziismo kaj burĝa individuismo. Ili diris fiere: "Ni laboras konsciencie ne por la salajro sed por la revolucio." Sola avangarda unuo ne signifas avangardecon, sed nur avangardiĝo de la tuta uzino signifas avangardecon. La maljuna heroo Ĝin Eng Un kun komunisma spirito meminciate forlasis la avangardan grupon kaj iris en postiĝintan laborgrupon por helpi ĝin en revoluciigo kaj laboristariĝo. La laborgrupo de la elektra fornego n-ro 5 estis post-

iĝinta laborgrupo. Alveninte al ĝi, Ĝin Eng Un unue faris enketon por trovi la ŝlosilan problemon en ĝi. Li trovis, ke la agmaniero de la vicgrupestro estas kruda kaj ne povas bone unuiĝi kun la kamaradoj de la grupo. Li do serioze studis kune kun la vicgrupestro kaj aliaj kamaradoj de la grupo instruon de kamarado Kim Il Sen kaj politikojn de la partio kaj emfazis ke por fari la kolektivon avangarda, oni nepre devas bone unuiĝi. Li ankaŭ faris korverŝajn interparolojn kun grupanoj kaj eĉ vizitis iliajn familiojn por ideologia laboro. Li ankaŭ helpis la vicgrupestro venki lian malbonan kutimon de nelernemo, ĝustatempe laŭdis bonajn farojn de grupanoj, kuraĝigis ilin fari konsilojn kaj proponojn en produkto kaj tiel mobilizis la iniciatemon de la tuta grupo. Post unujara kuna penado de ĉiuj kamaradoj, tiu postiĝinta grupo fariĝis avangarda kolektivo kaj akiris la gloran titolon de laborgrupo de mil-lia ĉevalo.



Diligente laboras laboristoj de la Martin-fornejo de la ŝtaluzino Gangsen.

1970 estis la lasta jaro de la Sepjara Plano por Disvolvo de la Nacia Ekonomio de Koreio. La laboristoj de la ŝtaluzino Gangsen firme decidis krei novan rapidecon en konkero de la alta pozicio en ŝtalprodukto de la Sepjara Plano, por oponi kontraŭ imperiismo kaj Usono kaj frue efektiviĝi unuigon de la patrolando. En la komenco de la jaro, laboristoj de la ŝtaluzino Gangsen elmetis la novan batalan proponon. Baldaŭ leviĝis tutlande tajdo de konkero de ĉiuj altaj pozicioj de la Sepjara Plano por renkonti la venkan malfermiĝon de la Kvina Kongreso de la Korea Labora Partio. Tiu-jare, la gvidantoj kaj laboristoj de la tuta uzino strebis unuanime helpante unu alian; la kadroj iris al la laborejoj por plifortigi la politikan laboron kaj maksimume mobilizi la revolucion aktivecon de la amasoj; dank' al energia disvolvo de la movado de teknika renovigo kaj komuna klopodo de la amasoj, la produktokvanto de ŝtalo estis duobligita kompare kun tiu de 1969, kaj la jara produkta plano estis superplenumita je tri monatoj antaŭ la fiksita dato. Ĉefministro Kim Il Sen

nomis tiun novan rapidecon de mil-lia ĉevalo "Gangsen-rapideco".

Dum la pasintaj 15 jaroj ekde la komenco de la movado de mil-lia ĉevalo de la ŝtaluzino Gangsen, arope aperis senĉese rajdistoj kaj laborgrupoj de mil-lia ĉevalo. Hodiaŭ ankoraŭ pli altiĝis la entuziasmo kaj batalspirito de la ŝtaluzino. Kaj brila sukceso estis atingita tuj je la komenco de la kuranta jaro. La produktokvanto de januaro duobligis ol tiu de decembro de 1970 kaj la afnacia tempo estis rimarkinde mallongigita. En la uzino ĉie vidiĝas sloganaj tabuloj, afiŝoj de rapidaj informoj kaj novaĵoj pri sukcesoj, defiaj leteroj kaj respondoj al ili. Ĉiuj en ĝi streĉe batalas.

Kiam ni forlasis la uzinon, Ĝin Eng Un diris modeste: "Ni faris ankoraŭ ne sufiĉe multe, multe malpli ol kiom ni devas fari laŭ la instruo de Ĉefministro Kim Il Sen." Je adiaŭo, li premis niajn manojn kaj elkore petis, ke ni transdonu salutojn de la laboristoj de Gangsen al la ĉina laboristaro.

Neforgeseblajn horojn ni trapasis en tiu uzino.

ĜAN ĈENG:

La Heroa Urbo Kaesong

NORDE de la mondkonata Panmenĝom-regiono majeste staras impona kaj bela urbo, la heroa urbo Kaesong sur la plejfronto de kontraŭusona batalo de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio.

Antaŭ dudek unu jaroj, la usona imperiismo kaj ĝia lakeo pupa kliko de Pak Ĝen Hi senskripule lanĉis tie agresan militon. Tiam, la usonaj agresantoj, en Cong Ak San-montregiono nord-

okcidente de Kaesong, preskaŭ ĉiutage faris armistajn provokojn kontraŭ la norda parto de la respubliko. Ekde 1945, en kiu la usona imperiismo anstataŭis la japanan imperiismon en okupado de la suda parto de Koreio, ĝis la 25-a de junio, 1950, en kiu ĝi lanĉis la agresan militon kontraŭ Koreio, la usona imperiismo faris sume pli ol mil okcent armitajn provokojn, farante sennombrajn krimojn kontraŭ la korea popolo.

Sub brava bato de la korea popolo, la usonaj agresantoj devigite venis al la tablo de armistica intertraktado en la urbo Kaesong.

En Panmenĝom, ĝis nun la korea popolo faras pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la usona imperiismo. Tiu domo, en kiu la usona imperiismo estis devigita konfesi sian malvenkon al la korea popolo kaj subskribi la armistican interkonsenton, hodiaŭ jam fariĝis historia ekspoziciejo. Per granda kvanto da solida historia materialo, la ekspozicio malkaŝis multe da krimoj de la usona imperiismo kaj ĝia lakeo, kiuj lanĉis la agresan militon kontraŭ Koreio, daŭre faras militajn provokojn post la armistico kaj estas ĉiumomente pretaj fabriki novan militon.

La kunvenoj de la milita armistica komisiono de Koreio jam fariĝis tribunalo, en kiu reprezentantoj de la korea popolo severe juĝas la usonajn agresantojn.

Sekvante la instruojn de la granda gvidanto kamarado Kim Il Sen, la heroo popolo de Kaesong, kun armilo en unu mano kaj kun falĉilo kaj martelo en la alia, alportis gigantan ŝanĝon al la malriĉa kaj postĝinta Kaesong.

Hodiaŭ Kaesong jam fariĝis socialisma industria urbo. En la tuta urbo troviĝas pli ol cent kvindek ŝtataj entreprenoj kaj loke administrataj ŝtataj entreprenoj. La specoj de industriaj produktaĵoj superis kvar mil, t.e. preskaŭ dudekoble pli multe ol tiuj de la regada periodo de la usona imperiismo kaj la pupa kliko de Pak Ĝen Hi. La totala taga produktokvanto de industrio egalas al la totala jara produktokvanto en la regada periodo de la usona imperiismo kaj la pupa kliko de Pak Ĝen Hi. Nun la urbo Kaesong ne nur povas produkti grandan kvanton da malpezindustriaj produktaĵoj, sed ankaŭ mil-tunan hidraŭlikan premaŝinon kaj diversspecajn ilmaŝinojn.

Samtempe kun la rapida disvolviĝo de la industria produktado, ankaŭ la agrikultura kaj flank-okupa produktado en la antaŭurbo de Kaesong prosperiĝas kun ĉiu tago. Antaŭ la Liberiĝo, la pliparto de tieaj kampoj estis en malaltaj areoj kun interplektitaj riveroj, kaj okazis konstante subakviĝo, tial la rikoltoj estis tre malabundaj. Post la Liberiĝo, radikala elimino de subakviĝo fariĝis ŝlosilo en disvolvo de la agrikultura produktado. En 1957, la kamparanoj en Long San Tong de la antaŭurbo ekkonstruis la faman kluzon de Huang Kang Po. Dank' al la peno de la kooperativaj kampa-

ranaj kaj urbanoj, grandioza amasa movado estis disvolvita kaj rezulte de tio oni plenumis la konstruadon en nur ok monatoj. De tiam, pli ol kvarcent okdek hektaroj da akvejoj sur Pong Dek-ebenejo transformiĝis en fekundan teron kaj fariĝis riĉa grenejo.


De 1957 ĝis 1960, en la antaŭurbo de Kaesong estis konstruitaj dek ses akvokonservejoj kaj tiel fundamente realiĝis irigaciado de la kampoj sur la ebena areo de la antaŭurbo.

Pro disvolviĝo de la agrikultura produktado en la antaŭurbo, la tuta urbo jam povas memprovizi per grenoj kaj neĉefaj mangaĵoj.

Ankaŭ la kultura, eduka kaj sanitara aferoj de Kaesong multe disvolviĝis. Nuntempe, en la tuta urbo estas kvar altaj lernejoj, pli ol cent tridek liceoj, elementaj lernejoj kaj teknikaj lernejoj. En ili sin trovas pli ol sesdek mil lernantoj, kiuj okupas pli ol kvaronon de la tuturba loĝantaro. Medicinaj kaj sanitariaj instalaĵoj troviĝas ĉie inkluzive forajn angulojn de la antaŭurbo.

Komparante la nunan vivon kun tiu en la pasinteco, la popolo de Kaesong, kiu spertis la du tute malsamajn epokojn novan kaj malnovan, ankoraŭ pli amas la novan socialisman vivon. Tial, ili ne nur plenforte sin jetis en la socialisman konstruadon, sed ankaŭ ĉiuj estas defendantoj de la sekureco de la patrolando kaj la fruktoj de venko. Ili konservas altan revolucionan singardemon. Antaŭ la saĝa kaj kuraĝa popolo de Kaesong, la spionoj senditaj de la usona imperiismo kaj la pupa kliko de Pak Ĝen Hi nur povas sin turni al kapitulaco. En somero de 1970, iu plenarmita spiono ŝteliris en la antaŭurbon de Kaesong, kaj li baldaŭ estis kaptita de knabo dekkvarjara. En vilaĝo ĉe la bordo de la rivero Lim Ĝen Kang apud la milita dividlinio, iu maljunulo kun aĝo de pli ol sepdek jaroj kaptis, en kunago kun laborista kaj kamparana ruĝa gvardio, spionon ĵus transirintan la dividlinion. La popolo de Kaesong jam faris sian urbon fortika fronta pozicio, kiu estas netransirebla de la malamikoj.

Sekvante la instruon de la granda gvidanto de la korea popolo kamarado Kim Il Sen **“Ni batalas por preventi militon, sed ni absolute ne timas ĝin; se la imperiistoj aŭdacos invadi per armitaj fortoj, ni certe ekstermos ĉiujn agresantojn”**, la popolo de Kaesong singardeme defendas tagnokte la sudan pordegon de la norda parto de la respubliko, kaj estas ĉiumomente preta doni solidan baton al la malamikoj kiuj aŭdacos invadi.



TIAN GENG:

La Tagoj Pasigitaj en la Lando de Montaj Agloj

DE la 12-a de julio ĝis la 12-a de aŭgusto de 1971, la Ĉina Atletika Teamo faris amikan viziton al la heroa Albanio. En la monato pasigita en la lando de montaj agloj, ni ĉiam dronis en maro de amikeco. La profunda amikeco de la popolo kaj sportistoj de Albanio al tiuj de Ĉinio ĉiam ekscitas nian koron. Ni vizitis multajn fabrikojn, agrikulturajn kooperativojn kaj revolucionajn muzeojn kaj propraokule vidis la bonegan situacion aperintan en la tagoj, kiam la tuta Albanio solene renkontas la 30-an datrevenon kaj la Sesan Kongreson de la glora Labora Partio de Albanio. En ĉiu loko de la heroa lando, ni estis kuraĝigataj de la sentima heroismo de la albana popolo en batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, kaj de ĝia revolucia spirito de penema luktado kontraŭ malfaciloj kaj sinapogo sur propraj fortoj en la socialisma konstruado. En kontakto kun la popolo kaj sportistoj de Albanio, ni multe lernis de iliaj noblaj kvalitoj kaj valora sperto.

Dum la vizitado, nin intime akceptis kamarado Mehmet Shehu, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Labora Partio de Albanio kaj prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj.

Ĉinaj kaj albanaj atletoj kune marŝas en la placon.





Ĉinaj kaj albanaj gessportistoj lernas unu de alia kaj interhelpas reciproke por kune altigi sian nivelon.

Li rakontis al ni pri la glora historio de la lastaj 30 jaroj de batalo farita de la Labora Partio de Albanio sub la gvido de kamarado Enver Hoxha kontraŭ en- kaj ekster-landaj klasaj malamikoj, kaj varme laŭdis la grandan amikecon inter Ĉinio kaj Albanio. Lia parolo donis al ni profundan edukon kaj kuraĝigon. Kamarado Shehu diris: “Kamarado Hoxha instruas nin **konstrui socialismon kun pioĉo en unu mano kaj pafilo en la alia**, tial ĉiu el niaj sportistoj devas esti samtempe batalanto!”

La 1-a de aŭgusto estas la tago de fondiĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. En tiu tago, altsaltisto Ni Ĝikin kaj trejnisto Kang Gjupej gastis laŭ invito ĉe Beqir Balluku, vicprezidanto de la Konsilantaro de Ministroj kaj ministro de nacidefendo. Lia familio varme gastigis ilin kiel siajn parencojn. Kamarado Balluku tre intime akceptis ilin kaj fotiĝis kun ili. Sur la foto donacita al Ni Ĝikin, li skribis jenan kuraĝigan vorton: “Vi devas, kiel sturmi malamikojn en milito, disvolvi la spiriton de braveco, obstineco kaj sentimeco al malfaciloj, sturmi pli altan rekordon!” Respondante la kuraĝigon de kamarado Balluku, Ni Ĝikin diris: “Mi observos vian instrukcion, kiel

soldato plenumas ordonon de oficiro, kaj diligente ekzercos min por akiri novan sukceson!” La parolo de kamarado Balluku enkorpigis la grandan prizorgon kaj esperon de la partiaj kaj registaraj gvidantoj kaj la popolo de Albanio al la ĉinaj sportistoj.

Ankaŭ en la vivado albanaj kamaradoj ĉiuflanke zorgis pri ni. Ili pretigis al ni plej bonajn kondiĉojn por ekzercado kaj ripozo kaj multe atentis pri nia sano.

En la kuna trejnado kaj amika prezentado de atletikaj sportistoj de Ĉinio kaj Albanio, ĉiam montriĝis emociaj scenoj pri amikeco inter Ĉinio kaj Albanio. La varmkoreco, modesteco, kuraĝeco kaj obstineco de albanaj sportistoj forte stimulis nin. Ĉu en la ĉefurbo Tiraneo aŭ en la norda grava urbo Shkodra kaj la apudmara urbo Durrës, ĉiufoja amika prezentado plene montris la komunan deziron de ambaŭlandaj sportistoj lerni kaj helpi reciproke, disvolvi amikecon kaj altigi la teknikan nivelon de sporto.

En 400-metra stafetkurado, ĉiufoje la sportistoj de Ĉinio kaj Albanio mikse grupigis sin. La rigardantoj varme aplaŭdis, aklamis kaj laŭdis

ke tio estas valora sceno sur sportejo, en kiu ambaŭlandaj sportistoj strikte kunagis en kurado. Ili diris, ke la malgranda bastoneto de stafetkurado montris la batalan unuiĝon inter la popoloj kaj sportistoj de Albanio kaj Ĉinio kaj simbolas nian sentiman marŝon ŝultro-ĉe-ŝultran en la komuna afero de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Albanaj juĝantoj, trejnistoj kaj sportistoj donis tre sincerajn, varmajn kuraĝigon kaj helpon al ĉinaj sportistoj en ideologio kaj tekniko. En stadiono de Shkodra, albana juĝanto rimarkis en trejnado ke la pozo de lancjetisto Ĝang Baŭ devas esti plibonigita, li tuj helpis lin korekti. Poste, Ĝang Baŭ rompis la landan rekordon de vira lancjetado. Resumante sian sperton Ĝang Baŭ ofte diris: "Mia sukceso estas neapartigebla disde la kuraĝigo kaj helpo de la albanaj kamaradoj." Kiam ni vizitis Shkodra, ni renkontis kamaradon Gani Alija, oficiron de la Albana Popola Armeo, kiu vizitis Ĉinion antaŭ kelkaj jaroj kiel sportisto de mezlonga kurado. Kvankam li longe ne partoprenis en konkurso, sed li iniciate petis partopreni en la kurado por akompani Ĝang Lihang, por ke li akiru pli bonan sukceson en 1,500-metra kurado. Dank' al la varma kuraĝigo kaj helpo, Ĝang Lihang renovigis sian personan rekordon kun braveco kaj obstineco.

La rapida altiĝo de sporta nivelo de Albanio profunde impresis nin. 20-jara altsaltistino Marjeta Pronjari estas bona ekzemplo. Antaŭ 5 jaroj, ŝi rompis la landan rekordon de virina altsaltado per 1.55 metroj kaj fariĝis unu el la bonaj sportistoj de Albanio. Ŝi daŭre klopodadis kaj glorigis la Patrion per pli alta atingo. Ŝi diligente studas dokumentojn de la Labora Partio de Albanio kaj verkojn de kamarado Enver Hoxha, por altigi sian politikan konscion; en trejnado ŝi serioze ekzercas sin kun vivpleneco de "tigrado", lerte utiligas avantaĝojn de sia korpo kaj kreis propran stilon. Ŝi senĉese akiris bonajn atingojn kaj fine kreis la landan rekordon de 1.78 metroj. En la 5 amikaj prezentadoj kune kun la Ĉina Atletika Teamo ŝi kvarfoje transsaltis la altecon de 1.75 metroj. Kiam ni gratulis al ŝi, ŝi modeste diris: "Mi devas plue klopodi!"

Kiam ni forlasis la landon de montaj agloj, la sportistoj de ambaŭ landoj tre bedaŭris la disiĝon. Ili manpremis, ĉirkaŭbrakumis kaj ekscitiĝis ĝis larmoj. Ni profunde sentis, ke la granda amikeco fondita persone de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj la granda gvidanto de la albana popolo kamarado Enver Hoxha kaj la komuna revolucia celo ligas la korojn de la popoloj kaj sportistoj de Ĉinio kaj Albanio.

La Muziko de la Moderna Revolucia Baledo «Ruĝa Virina Taĉmento»

Kolektive verkita de la Ĉina Baleda Trupo
kaj ludita de ĝia orkestro, surdiskigita
de la Ĉina Sondiska Fabriko en 1971.

La tuta kompleto havas tri diskojn kun diametro de 30 cm, $33\frac{1}{3}$.

Distribuas la Libroservo de la
Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, Ĉinio.

Aĉetu ĉe librovendejoj de via loko aŭ rekte ĉe la
Libroservo de ĈEL, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

Albana Gimnastika Teamo en Ĉinio


La Albana Gimnastika Teamo faris amikan viziton al Ĉinio de la 23-a de septembro ĝis la 31-a de oktobro de 1971 kaj ricevis varman bonvenigon de popolanoj kaj sportistoj de Ĉinio.


Dum sia vizitado al nia lando, la teamo faris kune kun ĉinaj gimnastikaj sportistoj brilajn prezentadojn kaj ekzercojn kaj ili lernis unuj de aliaj por kune altigi sian teknikon.

La sportistoj de la teamo vizitis fabrikojn, kamparon kaj historiajn restaĵojn en Pekino. La Albana Gimnastika Teamo vizitis ankaŭ niajn urbojn Nankino, Ŝanhajo, Ĉangŝa k.a.


La amika vizito de la Albana Gimnastika Teamo al nia lando pliapaŝe fortigis la revolucion amikecon kaj batalan unuiĝon inter la popoloj kaj sportistoj de Ĉinio kaj Albanio.

Ĉina kaj albana sportistoj kune ludas saltĉevalon.





Ĉinaj kaj albanaj sportistoj kolektive ludas saltĉevalon.



Albana sportisto ludas ringojn.

Ĉinaj kaj albanaj sportistoj kolektas kotonon kune kun membroj de la Popola Komunumo de Ĉina-Albana Amikeco, je vizito al ĝi.



Ĉinaj kaj albanaj sportistoj laŭte kantas revolucion kanton.



Ekskurso en la Somera Palaco

Arta Trupo de Rumana

Armeo Venis al Pekino

Laŭ la invito de la Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj, arta trupo Doina de la armeo de la Socialisma Respubliko de Rumanio venis al Pekino posttagmeze de la 6-a de oktobro,

sub gvido de divizia generalo Dinu Stelian, post sia vizito al la Demokratia Popola Respubliko de Koreio.

La arta trupo Doina de la rumana armeo prezentas rumanan dancon en Pekino.



La Prezento de la Japana Baleda Trupo “Macujama” Inaŭgurita en Pekino

TIU fama japana baleda trupo estas invitita de la Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj al nia lando por fari vizitan prezentadon. Ĝi prezentos ĉiĉoj al niaj spektatoroj la revolucion baledon *Blankhara Knabino* kaj aliajn nove kreitajn programerojn *Kvin Okinavaj Knabinoj*, *Japana Tamburo* kaj *Vjetnama Junulino*, kiuj spegulas la heroajn batalojn de la japana kaj vjetnama popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Vespere de la 3-a de oktobro, la prezento solene inaŭguriĝis en Pekino. Post la ceremonio la baleda trupo prezentis la revolucion baledon *Blankhara Knabino*, kiu ricevis varman akcepton de la spektatoroj.

Vang Guokjuan, respondeculo de la Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj, kaj Masao Simizu, estro de la baleda trupo, parolis unu post alia en la inaŭguro.


Vang Guokjuan diris: Nun la usona imperiismo kaj japanaj reakciuloj kreas publikan opinion por pliintensigi la revivigon de la japana militarismo. En sieĝo de reakcia kulturo, la baleda trupo Macujama persistas pri la revolucia literatura kaj arta direkto kaj atingis gravan sukceson en kreado de

nacia, revolucia baledo. Ni devas lerni tiun ilian valoran revolucion spiriton. Li diris: La vizita prezento de la baleda trupo en nia lando certe faros novan kontribuon por plifirmigi la batalan amikecon kaj kulturan interŝanĝon inter la ĉina kaj japana popoloj. Ni sincere deziras al ĝi plenan sukceson en ĝia vizita prezento.

La trupestro Masao Simizu diris: Ni ĉiam trovas ĉe la ĉina popolo varmegan akcepton kaj bonvenigon de nia alveno al Ĉinio. Ni rigardas tion kiel esprimon de amikeco kaj intiman kuraĝigon de la ĉina popolo al la japana revolucia popolo, kiu batalas por la amikeco kaj restarigo de diplomaciaj rilatoj inter Japanio kaj Ĉinio kaj kontraŭ la usona imperiismo kaj la revivigata japana militarismo sub ĝia ŝirmo.

Li diris ke la granda venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio, persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ, multe kuraĝigis la batalon de la japana popolo. Por ni la batalo kontraŭ la literatura kaj arta linio de la japana moderna reviziismo estas tre grava tasko. Kiam ni disvolvas revolucionajn literaturajn kaj artajn aktivadojn en niaj bataloj, la ĉinaj kamaradoj ĉiam nin kuraĝigas. Ni pretas decideme plenumi la rolon de dentradoj kaj ŝraŭboj en la liberiga batalo de la japana popolo.

Daĉun kaj Hi-er en la baledo Blankhara Knabino, ludata de la japana baleda trupo Macujama dum ĝia vizito al Ĉinio



La baleda trupo Macujama estas progresema arta grupo de Japanio, jam longe konata de la ĉinaj spektatoroj. Ĝiaj du vizitaj prezentoj en 1958 kaj 1964 lasis al nia popolo belajn memorojn kaj neforgeseblajn impresojn. La brila prezento plena de revolucia entuziasmo farita de la artistoj de la trupo en la inaŭguro ricevis varmajn aplaŭdojn de la spektatoroj.

Post la prezento, la Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj prezentis florkorbon al la aktoroj en tondraj manklakoj.

Novaj Floroj de Akrobata Arto

—Pri la Akrobata Trupo de Vuhan

LASTATEMPE, la Akrobata Trupo de Vuhan de nia lando prezentis tute novajn programerojn, kiuj vekis grandan intereson ĉe la spektatoroj.

Malfermiĝis la kurteno kaj komenciĝis la prezentado de la programero *Laboristoj de Navigaj Signaloj*. La animskua muziko kaj dekoracio portas la rigardantojn al la kanjono de Jangzi-rivero kun altaj rokmuroj kaj rapida fluo. Du laboristoj de navigaj signaloj en boato zorge esploras la signal-lanternojn sur la rivero por garantii sekuran navigadon. Subite ekhurlas ventego, ekruliĝas ondegoj kaj estingiĝas signal-lanterno sur kruta rokmuro. Kiel la ŝipoj povas sekure trapasi la danĝeran lokon sen signallumo? Por tuj ripari la signal-lanternon, la laboristoj obstine luktis kontraŭ la ondegoj. La akrobatoj ludantaj la rolon de signalaj laboristoj ĉiu starante sur peco de tabulo subtenata de ruliĝanta ŝtipo vivece manifestas la revolucionan spiriton de niaj laboristoj sentiman al malfaciloj kaj morto, farante diversajn danĝerajn movojn. Fine ili sukcesas kaj ekbrilas la signal-lanterno. Fajfante varŝipoj plenaj de materialoj por la industria kaj agrikultura konstruado de la patrolando sekure trapasas la danĝeran lokon.

Tiu programero, kiu spegulas la vivon de laboristoj de navigaj signaloj, prikantas ilian heroan agon kaj posedas konsiderinde altan nivelon de akrobata arto, rikoltis laŭdojn de la spektatoroj. Krome, la akrobatoj ankaŭ prezentis la programerojn *Ĉe Konstruejo*, kiu montras la sinforgesan laboradon de masonistoj, *Porti Akvon Surkape por Plantoj* kaj *Festado de Riĉa Rikolto*, kiuj spegulas kiel la komunumanoj en la kore-nacia Janbian-regiono kaj aliaj lokoj lernas de Daĝaj kaj akiras riĉan rikolton, *Trejnado de Pilotoj*, kiu prikantas la popolan aeran armeon, *Kolporti en Kamparo*, kiu montras kiel komercaj laborantoj tutkore servas al la popolo, kaj aliajn novajn programerojn.

La nova atingo de la Akrobata Trupo de Vuhan en revolucio de akrobata arto rezultigis el tio, ke sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ la revoluciaj akrobatoj profundigis en la vivon, akceptis edukadon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj diligente faras artan praktikadon en la lastaj kelkaj jaroj. Ilia prezentado estas nova provo pri servado al la proletara politiko kaj al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj per akrobata arto.

La ĉina akrobata arto havas longan historion kaj tradician nacian stilon. En la damninda malnova socio, la bienularo kaj burĝaro prenis ĝin kiel sian distraĵon kaj terure distordis tiun tradician arton, kiu fontis el la batala vivo de la laboranta popolo. Post la Liberigo, la akrobata arto estis reformita paŝon post paŝo kaj ĝia malnova fizionomio estis ŝanĝita. Antaŭ la granda kultura revolucio, la revoluciaj artistoj de la Akrobata Trupo de Vuhan faris provojn por pliapaŝa reformo de akrobata arto. Sed la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la literaturaj kaj artaj rondoj antaŭenpuŝis kontraŭrevolucionan reviziisman linion kaj plenforte oponis kontraŭ revoluciado al la akrobata arto. Kun la vana espero servigi akrobatan arton al ilia restaŭro de kapitalismo, ili diris absurde, ke “akrobataĵo estas afero pure teknika, komprenebla por ĉiuj kaj senklaseca”.

La Granda Proletara Kultura Revolucio frakasis la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de Liu Ŝaŭki. La akrobatoj diligente studis la instruon de Prezidanto Maŭ, ke “en la hodiaŭa mondo, ĉiu kulturo aŭ literaturo kaj arto apartenas al certa klaso kaj sekvas certan politikan linion”, kritikis la absurdajn reviziismajn tezojn de Liu Ŝaŭki kiel “literaturo kaj arto por la tuta popolo”. Ili komprenis, ke la akrobata arto, same kiel la aliaj formoj de arto, nepre servas al certa klaso kaj nia akrobata arto devas speguli la batalan vivon de la laboris-

toj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj la scenejo de la akrobata arto devas esti okupita de ili.

Sekve, la Akrobata Trupo de Vuhan ofte iris al fabrikoj, vilaĝoj kaj armeaj trupoj por partopreni en klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado, kaj samtempe entuziasme fari prezentadon por ili. Ĉie, kien la akrobatoj alvenis, ili petis laboristojn, malriĉkamparanojn kaj malsuperrajn mezkamparanojn rakonti al ili historiojn de familioj, fabrikoj, vilaĝoj kaj revolucia batalo de la loko kaj petis ĈPLA-anojn kaj avangardajn personojn rakonti pri sia sperto en studo de Maŭzedongpenso. Ili lernis de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj bonajn kvalitojn kaj profundan senton de la proletaro, per tio riĉigis sian vivon kaj forte antaŭenpuŝis la revolucion de la akrobata arto.

La reformo de prezentado de la tekniko "balanca tabulo" en *Laboristoj de Navigaj Signaloj*

Denove Lumiĝas la Signal-lanterno



estas ekzemplo pri tio. "Balanca tabulo" estas unu el la tradiciaj programeroj de tiu trupo. Delonge tiu programero estis ludata de akrobatoj balanciĝantaj sur tabuloj longaj je du futoj subtenataj de ruliĝanta ŝtupo kaj farantaj diversajn malfacilajn movojn. Por fari revolucion al la akrobata arto, artisto de tiu programero navigis kune kun laboristoj de navigaj signaloj, laboris kune kun ili sur buoj en rivero kaj luktis kune kun ili kontraŭ ondegaj. La revolucia spirito de la laboristoj de navigaj signaloj, kiuj tutjare batalas sur la ondeganta Jangzi-rivero kaj diligente laboras por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie, donis al li profundan edukon. Sub la helpo de la laboristoj, la artisto ellaboris kune kun la kreantoj de akrobataĵo la programeron *Laboristoj de Navigaj Signaloj*, laŭ la heroaj agoj kaj la karakterizaĵoj de ilia laboro, plene utiligante la teknikon de la larĝa movado de "balanca tabulo". Antaŭe oni ludis balancan tabulon sur ebena tablo, sed nun sur moviĝanta

modelo de ŝipo por prezenti la batalan vivon de laboristoj de navigaj signaloj per diversaj malfacilaj movoj. Tio estas tre malfacila. Sed la revolucia spirito de la laboristoj de navigaj signaloj kuraĝigis la akrobatojn. Ili pene ripetadis sian ekzercadon kaj baldaŭ jam sukcesis surscenigi la brilajn figurojn de laboristoj de navigaj signaloj.

Dum sia sceneja vivo de pli ol 40 jaroj, iu maljuna lerta iluziisto neniam ludis programeron por speguli la batalan vivon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. En la granda kultura revolucio li profundiĝis kune kun la krea grupo en praktikan batalon de amasoj por ricevi politikan nutron kaj trovi subjektomaterialon. Sub helpo de siaj kamaradoj, li kreis programeron pri komerca laboranto, kiu portas varojn en vilaĝojn por tutkore servi al la komunumanoj. Dum la provludado, li iris al vilaĝoj akompanante kolportan ĉaron de iu ĉiovendejo por servi al komunumanoj kaj senĉese pliriĉigi la pensan enhavon de sia programero. En tiu programero li uzis pli ol 10 iluziistajn artojn


kaj gustoplene prezentis la entuziasmon, paciencon, zorgemon kaj atentemon de komerca laboranto en sia servado. Ekzemple, per la tradiciaj iluziaĵoj *Ŝanĝi Veston* kaj *Turni Ŝiritan Paperon en Ĉapon* li montris, ke niaj komercaj laborantoj ne nur vendas ŝtofon sed ankaŭ faras vestojn kaj ĉapojn por malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. En la palpebruma momento, nova ĉapo jam estas metita sur la kapo de junulo kaj nova vesto jam estas surmetita al knabino kaj tiuj bone sidas al ili. Tiamaniere la iluziista arto trovis por si novan vojon.


En sia praktikado, la Akrobata Trupo de Vuhan kritike adoptis sanajn, reformeblajn kaj utiligeblajn formojn kaj teknikojn de malnovaj akrobataĵoj, laŭ la efektiva postulo por prikanti la batalan vivon de la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj. En la programero *Ĉe Konstruejo* ili montras la revolucionan spiriton de la masonistoj, kiuj sinforgese laboras por la socialisma konstruado, per la tradiciaj teknikoj "tranĉi brikojn per mano" kaj "portadi dispartigeblan ŝtupetaron" ktp. En la programero *Trejnado de Pilotoj*, per la arto de "salttabulo", ili kreis heroan figuraron de bravaj, sagacaj kaj viglaj pilotoj de la popola aera armeo, kiuj pene sin ekzercas por batali kontraŭ agresantoj. Ankaŭ aliaj tradiciaj



Geakrobatoj sur milita ŝipo

Porti Akvon Surkape por Plantoj





Lerni de elektraj laboristoj por krei akrobata programeron pri linia laboro sub tensio.

formoj kaj teknikoj, kiel “biciklado”, “turnado de teleroj” kaj “grimpado sur stango”, estas bone utiligitaj post reformo kaj prilaboro.

Por pli bone speguli la ardan batalan vivon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, la akrobata trupo aktive adoptis artajn formojn kaj esprimajn manierojn de operoj kaj dancoj, por ke ili kunfandiĝu kun la formoj kaj teknikoj de la akrobata arto kaj tiu arto plie perfektigiu kaj disvolviĝu. La nova programero *Porti Akvon Surkape por Plantoj*, por kiu oni adoptis la akrobataĵon “porti vazon surkape”, sukcese montras la revolucionan spiriton de la vastaj amasoj de niaj komunumanoj en batalo kontraŭ la naturo, utiligante la formon de emocia danco, fono-ekranon kaj sonoefekton.

Krom prezentado en teatro, la Akrobata Trupo de Vuhan ofte faris prezentadon en fabrikoj, kamparo aŭ barakoj. Se komunumanoj volas rigardi novajn akrobataĵojn dum tiuj artistoj partoprenas transplantadon aŭ rikoltadon de rizo, ili do prezentas programerojn kiel *Festado de Riĉa Rikolto* sur draŝejo dum ripoza horo, por esprimi la ĝojon de la komunumanoj dum festado de riĉa rikolto. Tie estas plej taŭga dekoracio kaj spektatoroj kun plej riĉa praktika sperto, kaj ĉiufoje ilia prezentado gajnis laŭdojn.

La Akrobata Trupo de Vuhan jam faris ĝojindan paŝon sur la ŝoseo de servado al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Nun ĝiaj membroj klopodas por krei kaj prezenti ankoraŭ pli multe da pli bonaj kaj ŝatataj de ili programeroj.


Festo de Riĉa Rikolto



AKROBATA ARTO

—de la akrobata trupo Fajrero
de Cangôŭ de Hebej-provinco


Milicaninoj ĉe Marborda Posteno (akrobataĵo sur oblikva ŝnurego)






Levi Bovlojn per Piedoj

Gimnastiko sur Lignaj Brikoj




Saltotabulo




Malsupre dekstre: Senmovigo de Biciklo sur Alta Stablo





Ruĝsilka Danco

Grimpado



Dekstre sube: Starado sur Unu Mano

Monociklado sur Ombrello





Neforgesebla Vojaĝo

El la letero de finlanda esperantisto A. LINJA



Ahto Linja

MI preskaŭ ĉiutage memoras Ĉinion kaj ĉinajn esperantajn geamikojn. Mi tutkore dankas la tutan popolon de Ĉinio kaj ĉinajn geesperantistojn pro la bonega gastigado je mia vizito en via amika lando. Mi neniam povos forgesi mian viziton en Ĉinio. Mi multe konversaciis kun miaj konatoj kaj ankaŭ aliaj personoj pri mia vojaĝo en Ĉinio. Multege da homoj estas interesitaj kaj volas scii multe pri Ĉinio kaj ĉina popolo. Mi estas feliĉa, ke mi povas rakonti al ili bonajn aferojn el Ĉinio, kiel bonkreskanta agrikulturo, industrio, higieno kaj afableco kaj amikeco de popolo

de Ĉinio, kaj tiel plu. Ĉiu partoprenanto de la finlanda amikeca delegitaro skribis artikolojn al gazetoj, rakontis kaj prelegis en radio kaj en televido kaj en publikaj kunvenoj pri Ĉinio. Nia vojaĝo en Ĉinio vekigis grandan intereson en la popolo de Finnlando kaj multege da popoloj volas scii pli kaj pli pri la vivo de ĉina popolo.

Mi donis al la prezidantino de Finlanda Esperanta Asocio la belan donacon, kiun vi petis min transdoni. Ŝi estis tre gaja kaj kontenta pro la donaco. Ŝi diris ke Ĉinio estas tia lando kien ŝi plej volonte vojaĝus kaj mi rimarkis ke ŝi estas varma amiko de Ĉinio. Ŝi jam estas tre maljuna virino sed tamen tre juneca.

Plej apartan artikolon bezonas mia dentaro, kiun la pekina dentkuracisto faris al mi (S-ro Linja akcidente perdis sian artan dentaron survoje al Ĉinio — La Redakcio). Agante laŭ la pensoj de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de Ĉinio, d-ro Vang Gie-ming faris al mi grandan helpon kaj servon, kaj mi neniam povas sufiĉe esprimi mian dankon. Mi estis tre malfeliĉa kiam mi rimarkis ke mia dentaro forestas. Mi jam intencis interrompi mian vojaĝon en Moskvo kaj reveni al Helsinki. Sed tamen, feliĉe al

mi, kelkaj el junaj virinoj de la delegitaro instigis min daŭrigi la vojaĝon. La dentaro kiun d-ro Vang faris al mi estas treege bone farita, ĉar ĝi konvenas precize kaj funkcias tre bone. Kaj la rapideco per kiu vi aranĝis mian dentan aferon mirigis ege ĉiun mian amikon, do tutan delegitaron. Ĉar jam tuj post duona horo je mia alveno en Pekinon estis kompetenta dentkuracisto preta helpi min kaj fari al mi dentaron. Mi scias kaj komprenas ke mi ŝuldas plej koran dankon al vi kaj same al tuta popolo de Ĉinio.

En numeroj 9 kaj 10 de *El Popola Ĉinio* estas tre interesaj artikoloj pri akupunkturo kaj pri malnovaj objektoj elfositaj en Ĉinio. Dankon, dankon pro ili. Ĉu estas permesite ke mi mallonge tradukas artikolon pri akupunkturo kaj publikigos ĝin en iu laborista gazeto?

Mi ankoraŭ dankas tutkore ĉinajn esperantistojn kaj ofere-man kompetentan dentkuraciston. Ankaŭ mi volas danki la helpemajn gvidantojn kiuj estis ĉiam afablaj kaj pretaj por ĉiuj. Ĉu vi povos diri al ili miajn korajn dankojn kaj salutojn? Mi ankoraŭ ripetas ke la vojaĝo al Ĉinio estas neforgesebla kaj memorinda al mi.

Kultura Interŝanĝo

LA JUGOSLAVA NACIA TABLOTENISA TEAMO VENIS AL PEKINO

Sub la gvido de Milan Novkovic kaj Borivoje Popovic, prezidanto kaj vicprezidanto de la Jugoslava Tablotenisa Asocio respektive, la Jugoslava Nacia Tablotenisa Teamo venis laŭ invito, la 6-an de oktobro, al Pekino por fari amikan viziton en nia lando.

La teamo konsistas el kvin viraj membroj: Dragutin Surbek, Anton Stipancic, Milivoj Karakasevic, Istvan Korpa kaj Bela Mesaros. La trejnisto estas Dusan Osmanagic.

ĈINAJ FILMOJ EN SVEDIO

La Kinoklubo de la Sveda Kinematografia Instituto inaŭguris en la projekcia halo de la nomita instituto en Stokholmo la projekciadon de naŭ ĉinaj filmoj. La inaŭguron ĉeestis personoj el svedaj kinematografiaj rondoj, respondeculoj de Sveda-Ĉina Amikeca Asocio kaj film-amantoj, sume pli ol 300 homoj. Ankaŭ Vang Dong, ĉina

ambasadoro en Svedio, kaj aliaj diplomatoj de la ĉina ambasadorejo ĉeestis la inaŭguron laŭ invito.

Post mallongaj paroladoj de la estro de la Kino-klubo kaj nia ambasadoro, estis prezentita la kolorfilmo de la revolucia moderna pekin-opero *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, kiu estis varme akceptita de la rigardantoj.

Ĉe la enirejo de la projekcia halo estis elmontrita du serioj da kolorbildoj pri *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* kaj *Ruĝa Virina Taĉmento*. La Kinoklubo plie presigis afiŝojn kaj klarigojn pri la ĉinaj filmoj. La klarigo diris: “La *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* estas modelo de teatraĵo, nova zorge polurita modelo de teatra arto de la proletaro el Ĉinio.” Pri la *Ruĝa Virina Taĉmento* oni komentas: “Kiel modelo de baledo, la *Ruĝa Virina Taĉmento* ne nur priskribas la revolucion de la proletaro, sed ĝi mem estas ankaŭ revolucio, kiu disrompas la burĝan formon de baledo.”

La naŭ filmoj estas: *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, *Ruĝa Signal-Lanterno*, *Ruĝa Virina Taĉmento*, *Tunela Batalo*, *Nankina Pontego super Jangzi-rivero*, *La Irigacia Kanalo Ruĝa Flago*, *21-jara Festo de la Granda Ĉina Popola Respubliko* kaj *Samlek Sihanuk en Vizito al la Sudo de Nia Lando*.



SKRIBIS DANLANDA LEGANTO F. M.

Pri la prezento de via vivmaniero, de via socia sinteno mi nur povas aplaŭdi. Mi sentas, ke via ĝenerala eduka celo estas, ke la “mi”, la egoismo, estu malpliigata, ke la homo vivu por kaj servu al aliaj. Ke tiu eduko efikas kaj havas grandan valoron, estas bone konstatebla el la fakto, ke viaj intelektuloj ne restas inter si kaj formas propran grupon, sed iras inter la aliajn hom-

grupojn, inter la malriĉajn kamparanojn, kaj kontaktas sincere kun ili. Per tio ili spertas la penadon de la laboro kaj la vivsintendon de la malriĉaj kamparanoj, kaj tio ja garantias bonan evoluon kaj komprenon pri la situacio. Do tiu modela socia sinteno certigas bonan socian estontecon. Mi gratulas vin.

SKRIBIS GFR-A LEGANTO L. K.

Jus mi finlegis la septembran numeron de *El Popola Ĉinio*. Estas ĉiam granda ĝojo legi vian revuon. Ŝajnas, ke EPC pliboniĝas de kajero al kajero. La septembra numero estas precipe bela. Mem estante studento mi legis kun granda intereso

la artikolojn pri ĉina eduka revolucio. Ankaŭ la artikolo sur paĝo 55 treege plaĉas al mi, tiel pro la teksto spegulanta la altan moralon de la ĉina popolo, kiel pro la bela desegnaĵo. Sur paĝo 1 la kanto *Ruĝas la Oriento* ekscitis mian intereson.

Bonvolu pli ofte publikigi tekstojn de ĉinaj kantoj kaj artikolojn pri la revolucia arto de via lando. La bildoj de la revolucia moderna baledo *Ruĝa Virina Taĉmento* (EPC 3/71) entuziasmigis eĉ miajn geamikojn neesperantistajn.

Ankaŭ la koloraj bildoj de la sepa numero estas tre belaj, ligante la majestatan ĉinan pejzaĝon kun sia heroa historio.

Heroa Batalado de la Patriotaj Armitaj Fortoj de Gvineo (Bissau)

SUB la gvido de la Afrika Sendependa Partio de Gvineo kaj Verdakabaj Insuloj, la heroaj Patriotaj Armitaj Fortoj de Gvineo (Bissau) jam persistis en batalado 8 jarojn, peze batis la portugalsajn koloniistojn subtenatajn de la usona imperiismo kaj faris multajn prikantindajn heroaĵojn.

SURPRIZATAKO AL MALAMIKA AERODROMO

10 kilometrojn fore de la urbo Bissau, la centro de la portugala koloniista regado, troviĝas aerodromo, kiu estas grava bazloko uzata de la portugala armeo por transporti municion kaj aliajn materialojn kaj bombadi liberigitajn regionojn.

La 19-an de februaro, 1968, 13 batalantoj el la Patriotaj Armitaj Fortoj faris al ĝi unuan atakon post detala rekognosko. Lerte ĉirkaŭirinte la fortikigitajn punktojn de la malamiko, ili proksimiĝis al la aerodromo noktomeze kun bombokanonoj,

bazukoj, mitraletoj kaj aliaj malpezaj armiloj. Ekster la pikildrata retaĵo ektondris ĉiuj pafiloj kaj la aerodromo tuj dronis en maro de fajro. La malamikoj falis en plenan haoson: la komandanturo ekbruliĝis, tri hangaroj estis trafitaj de obusoj, du el la aviadiloj sur la haltejo detruitaj kaj la aliaj difektitaj.

La 13 bravuloj sekure revenis al sia bazloko, sukcese plenuminte la taskon de surprizatako.

Post tio la Patriotaj Armitaj Fortoj de tempo al tempo atakis la malamikajn aerodromojn kaj donis severajn punojn al la portugalsaj aeraj rabistoj.

NOKTA ATAKO AL MALAMIKA KAZERNO

Iun aŭgustan tagon de 1970, eksterordinara "vigleco" regis en fortikigita punkto de la portugala armeo, ĉar venis festo de katolikoj kaj la pli ol 100 soldatoj kaj oficiroj en la kazerno volis sin regali

Popolaj Revoluciaj Armitaj Fortoj de Gvineo (Bissau) en disvolviĝo



per drinkado kaj amuzado. Ĉion detale rekognoskinte, la patriotaj batalantoj sekrete enpenetris en la kazernon en du grupoj sub la nokta vualo, sin maskovestinte en portugaliajn soldatojn, profitante la okazon, kiam la malamikaj gardostarantoj retiriĝis de la periferiaj postenoj al la kazerno por festeni. Kiam ili diboĉis, subite falis sur ilin malamaj kugloj. En konsterniĝo, ili povis fari nenion alian ol forkuri kaj pli ol 30 estis pafmortigitaj.

La patriotaj batalantoj finis la batalon en nur 20 minutoj kaj sekure retiris sin el la kazerno kun ĝojo de venko.

EMBUSKO KONTRAŬ MALAMIKAJ ŜIPOJ

Taĉmento el 14 patriotaj batalantoj marŝis al iu loko, kie trapasos malamika konvojo. Post priesploro de la tereno kaj fosado de kaŝejo, ili embuskiĝis en la arbaro apud la rivero. Sed, pasis unu, du, tri, kvar tagoj. . . , neniuj malamiko alvenis. La konvojo prokrastigis sian veturon. Spite al malsato, la batalantoj persistis en embusko ĝis la deka tago. Fine, aŭdiĝis de malproksime motora bruoj en la frua mateno. Venis la malamikaj ŝipoj!

Kiam ili venis en la pafkampon, la embuskantoj subite komencis densan, koncentritan kaj tre trafan pafadon: ĉiuj 4 motorigitaj bargoj estas subakvigitaj, escepte de la vundita rapida ŝipo, kiu rapideme

eskapis. En tiu batalo, pli ol 40 malamikoj estis ekstermitaj.

FRAKASO DE LA MALAMIKAJ ATAKOJ

Antaŭtagmeze en la 7-a de marto, 1969, la koloniistaj aviadiloj ripetade mitralis la batalpozicion de la Patriotaj Armitaj Fortoj apud iu vilaĝo en la suda liberigita regiono. Poste, surteriĝis dekkelkaj malamikaj helikopteroj kun pli ol 100 soldatoj. Posttagmeze, je la 1-a, sub la helpo de aviadiloj, ili komencis ataki la kontraŭaeran pozicion de la patriotaj batalantoj. Kvankam la malamikoj estis superaj en nombro, tamen la batalantoj aplombe rezistis. La lastaj ekpafis intense nur kiam la malamikoj alproksimiĝis en la distanco de 500 metroj. Fine, ili repuŝis la malamikojn. Post la 2-a, la malamikoj komencis alian atakon. La defendantoj batis kaj la infanterianojn kaj la aviadilojn per kontraŭaeraj maŝinpafiloj. Sume tri ofensivoj de la malamikoj estis frakasitaj, kelkdek el la malamikoj mortigitaj aŭ vunditaj kaj 3 aviadiloj faligitaj aŭ difektitaj.


La batalo daŭris 8 horojn. La vilaĝanoj energie subtenis la patriotajn batalantojn kaj multfoje alportis al ili municion, manĝaĵojn kaj akvon, sub la pafado de la malamikoj, tra senŝirma zono.

Ricevinte fortegan baton, la malamikoj forkuris en paniko.

Batalantoj de la Patriotaj Armitaj Fortoj de Gvineo (Bissau) faras militan ekzercon.



Milicano en liberigita regiono de Gvineo (Bissau)





LAOSAJ ARMEO KAJ POPOLO EKSTERMIS 700 MALAMIKOJN

De la 1-a ĝis la 13-a de septembro, la laosaj patriotaj armeo kaj popolo en la provinco Xieng Khoang kaj Boloven-altebenejo solide batis la pupan trupon, kiu atakis Jars-ebenejon kaj Boloven-altebenejon, kaj gajnis grandan venkon. Laŭ nekompeta statistiko, la armeo kaj popolo en Xieng Khoang ekstermis ĉ. 300 malamikojn kaj sur Boloven-altebenejo estis ekstermitaj pli ol 400 malamikoj inkluzive de ĉ. 200 tajaj reakciaj armeanoj.

1,300 MALAMIKOJ EKSTERMITAJ EN U MINH DE SUDA VJETNAMIO

La patriotaj armeo kaj popolo de U Minh de Suda Vjetnamio ekstermis 1,300 malamikojn dum la batalo farita ekde la posttagmezo de la 14-a ĝis la antaŭtagmezo de la 16-a de septembro. Inter la ekstermitaj malamikoj estis unu komandejo de brigado, unu komandejo de regimento, du batalionoj, du kompanioj kaj du plotonoj. Kaj krome 16 helikopteroj de la malamiko estis faligitaj aŭ difektitaj kaj 12 kanonoj estis detruitaj.

LA NACILIBERIGAJ ARMITAJ FORTOJ DE KAMBOĜO EKSTERMIS GRANDAN NOMBRON DA MALAMIKOJ

Dum la lastaj tagoj de aŭgusto kaj la komencaj tagoj de septembro, la Naciliberigaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo faris atakojn kontraŭ la malamiko kaj akiris multajn novajn fruktojn. Laŭ nekompeta statistiko, ili ekstermis aŭ grave difektis unu batalionan komandojn, kvar kompaniojn kaj du plotonojn, en kio ili mortigis, vundis kaj kaptis entute pli ol 800 malamikojn kaj kaptis grandan kvanton da armiloj, municio kaj aliaj militaj materialoj.

KANADA POPOLO DAŬRE OPONAS KONTRAŬ SUBTERA NUKLEA PROVO DE USONO ĈE ALEŬTOJ

La 24-an de septembro, 3,000 studentoj kaj mezlernejanoj de la okcidenta marbordo de Kanado


faris manifestacion tenante sloganajn tabulojn kun surskribo "Ĉesu nuklea ĉantaĝo".

Ankaŭ en la urbo Vankuvero 1,200 mezlernejanoj faris manifestacion antaŭ la usona konsulejo kontraŭ usona plano pri subtera provo de nukleaj armiloj.

Kanada popolo manifestacias por oponi kontraŭ la usona imperiismo pro ĝia subtera nuklea eksperimento sur unu el la aleŭtaj insuloj.



Kamboĝaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj atakis benzintenejon de la malamiko en Pnompeno. Multaj olecisternoj estis trafitaj kaj ekbrulegis.



Sur la kovrilo:

Profunda estas la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Koreio. Aktoro de la Korea Pjongjang-a Naciopera Trupo interparolas kun membro de propaganda trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Sur la dorskovrilo:

Akrobataĵo "Turnado de Tele-
roj"

Korespondi Deziras

*Alberto k. Maria Stagi, via Pisa 59, 54039 Romchi di Massa, Italio, kun geamikoj aziaj kaj afrikaj.

*Josef Vitovec, oficisto, Vodnany, Stoziek 550/11, Ĉeĥoslovakio, kun aziaj landoj.

*Jerzy Zyzniew, ski, Jaroszwiec, ul. Kolejowa, n-ro 4/11, woj. Krakow, Pollando, dez. interŝanĝi pm kun diverslandaj filatelitoj, k kor. por plibonigi studon de Esp.

*Lothar Kramer, 22-j. studento, D-5401 St. Goar, Am Werlauer Hang 8, Germana Federacia Respubliko, kun gejunuloj el tuta mondo.

EL POPOLA ĈINIO

人民中国报道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 12 (161) 1971

Ĉefa Enhavo

La Popolanoj de Nia Ĉefurbo Ĝoje Celebras Nian Brilan Nacian Feston	1
Marŝo al Agrikultura Mekanikigo	7
Nova Disvolvo de Industrio de Agrikulturaj Maŝinoj de Zunhua-gubernio	11
Disvolvi Kulturon de Akvaj Sterkaj Vegetaloj	16
Produktejo de Tilia Mielo	18
Ĉasgrupo Daŭhia	20
La Navigado de Vuĝoŭ Hodiaŭ	21
Fervoja Konstruado en Du Epokoj	28
Vej Jongfu, Sekretario de la Gubernia Partia Komitato..	33
Feliĉaj Laboristinoj de la Nova Ĉinio	36
Solena Prezenta Inaŭguro de la Korea Pjongjang-a Naci-opera Trupo en Pekino	40
Galopas la Mil-lia Ĉevalo	42
La Heroa Urbo Kaesong	45
La Tagoj Pasigitaj en la Lando de Montaj Agloj	47
Arta Trupo de Rumana Armeo Venis al Pekino	53
La Prezento de la Japana Baleda Trupo "Macujama" Inaŭgurita en Pekino	54
Novaj Floroj de Akrobata Arto	55
Neforgesebla Vojaĝo	59
Heroa Batalado de la Patriotaj Armitaj Fortoj de Gvineo (Bissau)	61

Certe Venkos la Heroa Laosa Popolo



Trupo de la Laosa Popola Liberiga Armeo batalanta sur Bolo-
ven-altebenejo ĵuras defendi la liberigitajn regionojn en kunveno.



Okupinte pozicion en Ban-Dong-regiono, la Laosa Popola Liberiga Armeo daŭre atakas la uson-pupan armeon.



Kontraŭaera artilerio de la Laosa Popola Liberiga Armeo

Trupo de la Laosa Popola Liberiga Armeo embuskas kontraŭ la malamiko.



Popolanoj de laosa liberigita regiono klopodas pliprodukti por subteni la fronton. La foto montras, ke virinoj kolektas kotonon en riĉa rikolto.





Virinoj en laosa liberigita regiono heroe batalas ŝultro ĉe ŝultro kun viroj kontraŭ atako de uson-pupa armeo.



Batalantoj de la Liberiga Armeo en suda Laoso triumfe revenas kun multaj militkaptajoj.

Ĉinaj Poŝtmarkoj

La 1-an de julio, 1971, la Komunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis per la poŝtoficejoj tra la tuta lando serion da memorigaj poŝtmarkoj kun la titolo "Celebre al la 50-a Datreveno de la Fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio". Ĝi konsistas el 9 pecoj kun valoroj de 4 cendoj, 8 cendoj kaj 22 cendoj.



Kunveno de la Unua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio en Sanhajo



Instituto de Kampanara Movado de Kantono



Ginggang-montaro — la revolucia lulilo



Kunveno de Zunji-konferenco



Revolucia Sanktejo Jan-an



Tian-anmen-pordego en Pekino

庆祝中国共产党成立五十周年

庆祝中国共产党成立五十周年

庆祝中国共产党成立五十周年

1921 — 1971



中国人民邮政

8分

(18)

1971




中国人民邮政

8分

(19)

1971



中国人民邮政

8分

(20)

1971

Alte tenante la standardon de unuiĝo kaj venko, la popolo de la tuta lando venke antaŭenmarŝas en la direkto montrita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong.

